

LE MONDE *diplomatique* EN ESPERANTO

MSF, 2012 Papera eldono de *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) kaj de la Monda Asembleo Socia (MAS) <http://mas-eo.org> 8 paĝoj 2,50 €

Post Tobino

de SERGE HALIMI

En 1997 nia gazeto popularigis la ideon de imposto pri la financaj transakcioj.¹ Tiuj estis tiam dekkvinoble pli grandaj ol la monda jara produktado. Hodiaŭ ili estas preskaŭ sepdekoble pli granda. Antaŭ dek kvin jaroj oni apenaŭ parolis pri la *subprime*-kreditoj kaj neniu imagis krizon de la ŝtataj ŝuldoj en Eŭropo. La plej multaj eŭropaj socialistoj, ensorĉitaj de s-ro Anthony Blair, pensis nur pri la «financa ennovigo». En Usono, la prezidanto William Clinton komencis kuraĝigi la deponbankojn spekulati per la mono de siaj klientoj. S-ro Nicholas Sarkozy siavice genuis antaŭ la usona modelo kaj laŭdis la politikon de la Federacia Rezervo,² kiu poste montriĝis katastrofa. Li revis pri *subprime*-kreditoj en franca stilo...

Do, en 1997 la Tobin-imposto tute ne estis ŝatata, ĉar ĉio funkciis ja tiom bone! La franca ministro pri ekonomio kaj financoj, s-ro Dominique Strauss-Kahn, juĝis ĝin tuj nepraktikebla. Kaj s-ro Sarkozy deklaris: «*La afero de la Tobin-imposto estas absurda [...] Ĉiufoje kiam ni punas la kreadon de riĉaĵoj sur nia teritorio, ni favoras la kreadon de riĉaĵoj ĉe la aliaj*».³ Tuj post kiam li enposteniĝis kiel prezidanto de la respubliko, li taskis sian ministrinon pri ekonomio kaj financoj, s-inon Christine Lagarde, nuligi borsan imposton. La nuna ĝenerala direktorino de la Internacia Mon-Fonduso pravigis tion jene: «*Tiu ĉi dispono kontribuas fortigi la logon de Parizo kiel financejo*». Sen tio, avertis ŝi, «*la plenumado de certa nombro de financaj decidoj [fariĝus] el eksterlandaj financejoj, kiuj jam delonge nuligas similajn impostojn*».⁴

Poste, la okazaĵoj montris la nekomprenon de la politikaj respondeculoj, kiuj esperis profiti el la «financa ennovigo» per praktikado de imposta dumpingo. La ŝtatoj savis la bankojn sen trudi al ili alian kontraŭparton ol ankoraŭ pli grasajn profitojn. Sed ĉar neniu decido estis farata kontraŭ la financo, oni nur gurdus plej enuigajn proklamojn kontraŭ la «reĝo mono». En Usono eĉ la ultrakonservativaj respublikanaj kandidatoj skurĝas ĉi-momente la «vulturojn» de *Wall-Street*, kiuj «*ŝtelas la tutan monon de via entrepreno, bankrotigas vin kaj foriras kun la milionoj*».

Estas do ne tre surpriza, ke kvar monatojn antaŭ la fino de sia mandato, s-ro Sarkozy diras, ke li volas «*partoprenigi la financon en la riparado de la detruoj kiujn ĝi kaŭzis*». Forgesita estas la «absurdeco» de imposto pri financaj transakcioj; forvaporigis la danĝero, ke la oraj ovoĵoj de spekulado floros eksterlande.

Ankaŭ ni povus nun daŭre kontentiĝi per «*ĵeti sablon en la radaron de la financon*», kiel postulis la ekonomikisto James Tobin. Sed, ĉar estas klare, ke la financo estas vivnecesca publika havaĵo, per kiu la akciuloj povas ostaĝigi la socion, ankaŭ ni devas iri antaŭen. Kaj postuli, ke la bankoj ĉesu aparteni al privataj interesoj. ■■■■■

¹ Vd Ibrahim Warde, «*Le projet de taxe Tobin, bête noire des spéculateurs [La projekto de la Tobin-imposto, teruraĵo por la spekulistoj]*», kaj Ignacio Ramonet, «*Désarmer les marchés [Senarmigi la merkatojn]*», *Le Monde diplomatique*, respektive februaro 1997 kaj decembro 1997.

² «*Se mi devus nomi modelon, tiu estus Alan Greenspan*», klarigis li al la gazeto *Les Echos*, la 23-an de junio 2004. «*Li ĉiam agis pragmate kaj humile*».

³ France 2, 7-a de junio 1999.

⁴ Debato en la Senato, la 23-an de novembro 2007.

Ĥaosa malfondo de la USSR

de NINA BACHKATOV

LA 8-AN DE DECEMBRO 1991, tri prezidantoj kunvenis, kiel konspirantoj, en ĉasista domo funde de profunda belorusa arbaro. Sen mandato, nek de sia respubliko nek de la ceteraj respublikoj, la ruso Boris Elcin, la ukraino Leonid Kravĉuk kaj la belaruso Stanislav Ĉuŝkeviĉ subskribis la interkonsenton nomatan «de Minsko», kiu malfondis la Union de Socialismaj Sovetrespublikoj (USSR) la

la dek kvin, formaligis la novan KŜŜ. La tri baltaj landoj (Estonio, Latvio, Litovio) kaptis la okazon por turni la sovetian paĝon kaj aliĝi al la landaro de centra kaj orienta Eŭropo kaj, post la falo de la Berlina muro, komencis likvidi la komunisman heredaĵon kaj postulis sian lokon en institucioj kiaj Eŭropa Unio kaj Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). La tiama naciisma registaro de Kartvelio, zorganta pri sia totala sendependeco, rifuzis aliĝi al KŜŜ dominata de Moskvo.

La fino de la USSR estas simbologita per la bildo de ruĝa flago malsupriĝanta de sia masto por esti anstataŭita de la rusa trikolora flago, kiu de tiam flirtas super la Kremlo. Tio okazis la 25-an de decembro, do kelkajn tagojn post kiam la USSR-prezidanto Gorbaĉovo (Miĥail Gorbaĉov) demisiis antaŭ la evento de la 31-a de decembro. La dek kvin respublikoj, nun sendependaj, devis nun mastrumi la problemojn de sia eliro el la sovetismo, unu per la rompo kun la marksisma-leninisma ideologio kiu, malgraŭ la seniluziigo de multaj sovetianoj, estis ankoraŭ la cemento de la politika, ekonomia kaj socia vivo de la lando.

DO, NE MIRIGAS, ke la novaj ŝtatoj provis trovi anstataŭaĵojn por certigi socian kunteniĝon kaj por pravigi la instituciojn: tiel la naciismo kaj la religio refirmiĝis tiom pli forte, ĉar ili estis subpremataj de la sovetia sistemo. La gvidantoj ĝenerale lanĉigis en reskribado de la pasinteco, por krei nacian senton de la landoj, kiuj estis ofte sen historiaj referencoj en siaj novaj landlimoj. Necesis do valorigi mitojn: la fiera kaj libera kozako, praulo de la ukrainoj; la heredaĵo de Ĝingis Kano de pluraj landoj de centra Azio, ktp.

SED ĈEFE ekzistis la politikaj, ekonomiaj kaj sociaj problemoj. Ĉiuj ĉi novaj respublikoj devis konstrui elektran demokration, dum ne ekzistis organizaĵo ekster la Komunista Partio. En la plej bona kazo evoluis fendigo inter la partio en la potenco, la

En tiu ĉi numero

FRÉDÉRIC LORDON

Ununura valuto, la sensolva ekvacio.

Sur la glittubo de la eŭropa krizo / 2

TRISTAN COLOMA

Civila bolado Demokrata Respubliko Kongo en kampanjo / 3

PATRICK HAIMZADEH

Multigo de la povocentroj.

Kiu gajnis la militon en Libio? / 5

EDUARDO GALEANO

Voĉoj de la tempo / 6

IGNACIO RAMONET

Klimataj urĝaĵoj / 6

DE PHILIP S. GOLUB

Britujo, Usono, Ĉinujo...

Kiel la imperioj disfalas / 7

IGNACIO RAMONET

Hispanio, en tuja danĝero / 8

komunista opozicio, strukturita sed nekapabla reveni al la potenco per la urnoj – krom en Moldavio en 2001 – kaj nekomunista opozicio splitita en grupetojn konstante regroupiĝantajn laŭ kvereloj pli personaj ol ideologiaj.

Ekonomie la defio konsistis en urĝe anstataŭigi la sistemon de centra planado per merkatekonomio. La eksterlanda helpo trudis modelon ultraliberalan kaj la totalan malfermon al eksterlandaj investoj, kiuj profitis per la mankoj de la politika personaro kaj per la manko de nemarkсистaj ekonomistoj kaj tiel akiris malegalecajn kontraktojn, por kies malfaro la respublikoj bezonis jarojn. Necesis ekz-e atendi la jaron 2003 por ke la rusa parlamento (*duma*) ŝanĝis la leĝon pri la disdivido de la produktado kaj de la profitoj, nomata PSA (Production Sharing Agreement),² kaj 2010 por ke Kazaĥio trudiĝu kontraŭ la investistoj de la kazaĥiaj petrolkampoj.

Fine, la sociaj problemoj multis. Por la plimulto de la loĝantaro la fino de la USSR signifis la rompon de familiaj, kulturaj, sciencaj ligoj inter la respublikoj. La divido de la infrastrukturoj en unuoj ne ekpluateblaj dise kaj la malfermo de la naciaj merkatoj al importoj mortigis milojn da dungoj. La loĝantaro malkovris la malsekurecon kaj la timon antaŭ la morgaŭo, la malegalecon inter sociaj klasoj, la erozion de la familiaj valoroj, la gravecon de la mono kaj de la materiaj havaĵoj.

Alfrontitaj al identaj problemoj, la registaroj, malgraŭ kelkaj naciaj variaĵoj, faris similajn respondojn: ĉie la potenco baziĝas sur forta prezidanteco, parlamento kiu funkcias kvazaŭ registrejo, gazetaro kiu, vole aŭ ne, subtenas la oficialajn poziciojn. En la ekonomio, la interveno de la ŝtato ebligas konservi la lokajn entreprenojn kaj trudi al la privataj societoj kontribuojn al la sociaj servoj kaj al la regionaj infrastrukturoj. Tiu funkciado, supozata provizora, devis lasi la tempon al la merkatekonomio por generi sufiĉan financan solidecon por alfronti la internacian konkurencon; ĝi estas ankoraŭ valida. ■■■■■

¹ Ĉefurbo de la tiama Kazaĥio, poste nomata Almatio. De 1997 la ĉefurbo estas Astano.

² Ĝi reguligas la disdividon de la profitoj inter la investinto kaj la koncerna ŝtato.



IGOR NOVIKOV / «Prom Russian Question» (De la question russe), 1984

31-an de decembro 1991 kaj anstataŭigis ĝin per la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (KŜŜ). La dek du ceteraj federaciaj respublikoj, kiuj tiam konsistigis la USSR, estis invitataj aliĝi al ĝi.

Ili estis surprizitaj: kvankam la plej multaj el ili parolis jam de monatoj pri «suvereneco», ili neniam - krom la baltaj respublikoj - pensis pri totala sendependeco. La bato estis aparte profunde sentata en centra Azio kaj en Kaŭkazio - kun la escepto de? Georgio]. La kazaĥa prezidanto Nursultan Nazarbajev juĝis netolerebla ke tia decido povus fariĝi en foresto de la dua plej granda lando de la USSR. Lia indigno memorigis al la tri prezidantoj, ke la Soveta Unio ne estis limigita al la slava mondo.

Okazis do dua etapo, la 21-an de decembro, en Alma-Āto¹. La samnomaj interkonsentoj, subskribitaj de dek unu respublikoj el

Ununura valuto, la sensolva ekvacio. Sur la glitubo de la eŭropa krizo

Kio okazas, kiam la lasta rifuĝejo mem estas skuata de tempesto? Merkredon la 23-an de novembro, la investantoj ne montris intereson al oferto de germana ŝuldo, signo de ĝis nun nespertita malfido. Kaptitaj en la propraj retoj, la merkatoj, kiuj postulis rigorecon, nur timas malkreskon. Al tiu zigzaga navigado provas respondi «pintkunvenoj», kies multeco tamen montras la senutilon

de FRÉDÉRIC LORDON

Pro sperto oni scias, ke oni povas spekti la komikulojn Laurel kaj Hardy ĵeti kremtortojn unu al la alia nekalkuleblajn fojojn, kun senlaca plezuro. – Sed la eŭropajn pintkunvenojn?... Pro bedaŭrinda takseraro, kvankam kun la sendube laŭdinda intenco lukti kontraŭ malĝojo, la Eŭropa Unio (al kiu ni povas aldoni la G20) ŝajne konsideris, ke la ripetada komikeco povas esti armilo kontraŭ la krizo. Oni ne trovas alian hipotezon por klarigi tian konstantecon en bufonaĝo, fariĝinta la sola klara gvidlinio de eŭropaj regantoj, cetere en stupora stato.

Necesas rekoni, senkulpige al ili, ke sub la premo de la trudaj cirkonstancoj (grandega recesia ŝoko sekvanta la financon krizon, konstanta kontrolo de la ekonomiaj politikoj fare de la kapital-merkatoj, sendependigo kaj senkuraĝeco de la Eŭropa Centra Banko (ECB), ortodokso-obsedo de Germanujo, manko de unuiĝita suvereneco), la nuna ekvacio de la eŭro restas sen solvo.

Se ne la spirito de Laurel kaj Hardy, eble tiu de sankta Aŭgusteno regas nun en Eŭropo: «*Credo quia absurdum*» (mi kredas, ĉar tio estas absurda). Veras, ke la dogmista persistemo malgraŭ la malkonfirmo de la realo ne multe impresas en Eŭropo. Finfine, estas nur la kvina pintkunveno de la eŭrozono,¹ la aŭgustena flanko konsistas el la konstanteco de absurdo, kaj la komika flanko el la ripetataj komunikoj gaje anoncantaĝo, ke oni finfine alportis ĝeneralan (angle: *comprehensive*) solvon al la problemoj de la eŭrozono... ĝis ĉio estos refarenda, la venontan fojon.

Oni ja scias, ke la publiko estas malatentema, tial verŝajne la turism-oficejo sentas bezonon renovigi la spektaklon proponante pli kaj pli fortajn sensaĵojn (novajn instituciojn, novajn savendajn landojn, novajn financajn «tubarojn», engaĝitajn sumojn ĉiam kreskantajn, ktp.). En la realo, malmultaj homoj ankoraŭ emas ridi, eĉ ne pri la lasta pintkunveno de la Eŭrogrupo de la 27-a de oktobro 2011, kies grandegaj (kaj ĉiam *comprehensive*) sukcesoj estis kvazaŭ neniigitaj en malpli ol semajno per la aperanta fantomo de greka referendumo, tio estas absoluta rekordo.

Reale, kaj tio estas verŝajne la propra marko de epoko, kiu kompareblas nur neperfekte al la krizo de la 1930-aj jaroj, la registaraj reagoj havas duoblan karakteron, ŝajne kontraŭdiran, de vera konfuzejo, kie improvizado konkuras kun profunda nekompreno de la okazantaj eventoj, kaj de oportunisma sed tre metoda disvolvado de severa novliberalisma agendo. Necesas havi enkape ĉi tiun ambiguecon por taŭge klarigi tiel la *Helzapoppin*-stilajn pintkunvenojn, kiel la imponan strategian reziston, kiu ebligas al la nuna sistemo ĉerpi el la fundo de la (sia) krizo, la okazon de senprecedenca historia enprofundiĝo. Kohero kaj malkohero do estas du egalaj partoj en ĉi tiu miriga periodo, kie ludiĝas la destino de novliberalismo laŭ duuma kodo: definitiva brutigo aŭ dumfluga eksplodo.

Piroteknikistoj sin opiniantaj kvitaj, eksplodiginte la konstruaĵon, ĉar ili pagis la pulvoron

La interesoj de forgesemo estas tiom potencaj, ke necesas daŭre memori kiom la nunaj eventoj ŝuldas sian originon al la krizo de la hipotekaj kreditoj, kiu estas mem esprimo de certa stato de kapitalismo, en kiu la senlima premo de salajroj lasis la enŝuldiĝon de familioj kiel nuran solvon por subteni la ekonomian postulon. Tiel ke, pro sia savo de la bankoj kaj la recesio, la ŝtato troviĝis senvole kunportata en la poststrion de la privata financa disfalo... kiu pro tio estis transformita en publikan financon krizon. Tiam malfermiĝis, flanke de la G20, en siaj 2009-eldoj (Londono, Pittsburgh), la sekvenco de la «ek kaj halt'» (*stop and go*) pintkunvenoj. Sed kiu ankoraŭ memoras la venko-kriojn de la regantoj kaj komentistaroj kune, konsoliĝo verŝajne proporcia al la grandega timo, kiu ilin stuporis, kiam, en aŭtuno 2008, la abismo-rando estis tiom proksima?

Ja prefereble forgesi la triumfajn komunikojn, la promesojn de financa re-regulado (kiuj aspektas ridindaj en 2011, kiam la tutan bank-sistemon denove minacas ruiniĝo) kaj la certigojn, ke «la krizo estas nun malantaŭ ni», kiujn oni hezitas klasifiki en la kategorioj de gaja dadaisma pro-

voko, aŭ de plej vastega stulteco. Sufiĉis malpli ol unu jaro, por ke la anoncita rekresko serioze ektusis, kaj por ke la malkaŝo de la ruina stato de la grekaj publikaj financoj agis kiel eksplodigilo de tio, kio restos la plej malbona returniĝo de la tuta historio de ekonomia politiko. Momenton oni estis povintaj kredi, ke la registaroj sukcesis lemi el la pasintaj eraroj kaj aparte el la katastrofo de la Granda Depresio, sed tute ne! La akceptado de la deficitaj, tra la funkciaj aŭtomataj stabiligiloj,² sola praktikebla mezdaŭra strategio (se ne estus la delira kuratoreco de la merkatoj), ne daŭris unu jaron. Kaj la greka kazo prezentiĝis kiel preteksto, ideala kaj kun ŝajn e bona bazo por renversi la tutan disponaĵon de la buĝeta politiko, kiu abrupte pasis de la racia praktiko de deficitaj al la senespera strebado forte redukti ilin.

Krom ĉi tiuj, kiujn oni persiste nomas «respondeculoj», ni ĉiuj de nun scias la kialojn – ja evidentaj de la komenco –, kiuj nepre kondukas la strategion de ĝenerala malabundo al malsukceso: la neeblo por ĉiu aparte kompensi pere de la ekstera postulo la strangolitan internan postulon, ĉar la aliaj same elektis rigoron, nepre kondukas al reduktoj de kresko tiaj, ke la perdoj de imposta enspezo detruas la efikon de la elspezo-reduktoj. Ĉio tio okazas sub rigardo kaj minaco de la internaciaj investantoj, kies tempa horizonto estas tute nekongrua kun la mezdaŭro necesa por tiom vasta makroekonomia alĝustigo. El tio sekvas absurda sinsekvo, en kiu la altiĝoj de interezkvotoj estigitaj de momentoj de spekulaj panikoj aldone malbonigas la buĝet-saldojn (la ŝuldoservo grandigas la deficiton, kiu alarmas la financistaron, kiu altigas la kvotojn, kiuj plipezigas la ŝuldoservon...), kaj al tio la ekonomiaj politikoj respondas pligrandigante la rigoron... kaj la ŝuldojn – de tempo al tempo *Standard & Poor's* aŭ *Moody's*, perfektaj etoso-agentoj, alportas sian afablan kontribuon al la klimato de ĝenerala frenezo. Momenta puŝo de financa paniko, altiĝo de la kvotoj kaj absurdaj reagoj de la ekonomiaj politikoj do altiras unu la alian en toksa sinergio, kiu la serio de eŭropaj pintkunvenoj ĉiufoje pliiintensigas.

Tamen, kaj kvankam paradokse, ĉi tiun ĥaosolinon akompanas strategia linio, pro kio ĉiufoje la malordo-kresko estas akompanata de paralela kresko de la novliberalismaj antaŭeniroj. Ĉar la krizo ne frapas ĉiujn. Kaj ne nur ne la bankistojn senpage restarigitajn, kun siaj bonusoj kaj dividendoj post la aŭtuno 2008. La decentrigo de la atento ekde la difektoj de la privata financo ĝis la «problemo de la publika ŝuldo» estas levinta je ties plej alta punkto la arton de diversio, forĵonglado kaj kontraŭ-atako. Ne temas, ke nenio okazas ĉe la flanko de la publikaj ŝuldoj – oni eĉ malofte povis vidi tiom rimarkindan eksplodon. Sed okazas nenio, kio ne estas rekta efiko de la privata financa krizo – kaj la bankistoj, kiuj fanfaronas, ke ili plu ŝuldas nenion al la socio ĉar ili repagis la urĝo-monhelpojn, agante kvazaŭ la sekvinta recesio, la disfalo de impostaj enspezoj, kaj la eksplodo de deficitaj, ne okazis pro ili, pensigas onin pri piroteknikolernantoj, kiuj sin opinias kvitaj, eksplodiginte la konstruaĵon, ĉar ili pagis la pulvoron.


Okazo ne perdita por la bankistoj, ankaŭ ne por la kleraj administrantoj de la novliberalisma ordo, al kiuj oni rekonu almenaŭ la realan talenton transformi en grandan antaŭeniron krizon, kiu devintus estiĝi ilian historian malkvalifikon. Ja delonge avertoj pri la temo de ŝuldo provis, tra la raportoj de Pébereau³ aŭ de Attali,⁴ prepari la terenon kaj alkitumigi la mensojn al la ideo de rabotado. Sed ĉiuj komedioj pri deklamitaj malbenajoj kaj tremantaj anoncoj pri alvenanta bankroto ne sufiĉis por kredigi je ekzisto de problemo ne ekzistanta – almenaŭ ĝis 2008. La privata financa krizo, kiu senseble kreskigas la publikajn ŝuldojn, tiu ja tion povas fari. Kaj, ĉar la «ŝuldo-problemo» neniam ŝajnis tiel objektivite ekzistanta, heterogena kombinaĵo de oportunistaj strategiistoj kaj de kreduloj eniris la breĉon por proklami, false maltrankvilaj kaj vere ravitaj, la urĝecon – fine! – de la granda alĝustigo.

En la vestaĵoj de «racia» kaj «necesa» respondo de la buĝeta politiko al aparta konjunkturo, estas fakte struktura strategio de ŝrumpado, pre-

fere eĉ diri malkonstruo, de la sociala ŝtato, kiu naskiĝas en printempo 2010, portata de la forto de situacio, en kiu la liberalistoj kredas, ke eblas ĉerpi sufiĉan pravigon por malkonstrui tion, kio ĝis nun rezistis. Oni jam konis la ordinaran funkciadon de la buĝeta alĝustigo: ne-anstataŭi la funkciulojn emeritiĝantajn, malaltigi iliajn nominalajn salajrojn, abrupte detranĉi la publikajn elspezojn, malpliigi la socialajn monhelpojn, altigi la aldonvaloran imposton (AVI), ktp., sed ĉi tiu benata konjunkturo permesas praktiki ilin je ankoraŭ ne atingita skalo. Kaj tio, antaŭ ol aldoni kvalitan ŝanĝon al la nura kvanta intensigo. Ne estas do hazardo, ke la ideo de buĝeta alĝustigo, unue aperinta komence de 2010 laŭ

Fortondinte la publikajn buĝetojn, ek al la malaltigo de salajroj

Kio povas resti el la strategio de alĝustigo de deficitaj, kiam ĉiuj kreskoj disfalas tiel samtempe, kaj kiam ĉi tiu samtempigo mem antaŭvidigas kelkajn dolorajn aldonajn sinergiojn? La registaroj ŝajnas konfuze konscii tion, kaj oni jam povas observi antaŭsignojn de ŝanĝoj, kiuj sen forlasi la valorajn konkeraĵojn de rigoro, aldonus al ili novajn evoluojn en novaj direktoj. Fakte novliberalismo havas du obsedojn: la ŝtato, kaj la rezisto de la dungitaro. Sed, ĉar oni ne rajtas diri aferojn tiom krude, ĝi dispremas la unuan pretekste de la ŝuldo, kaj atakas la duan per la vorto: «kosto de la laboro kaj konkurenco».



JONATHAN LASKER / «Stable Aberrance» (Erreur permanente), 1995

sia ordinara formo, alprenis en 2011 la superan formon de la «ora regulo»,⁵ ankoraŭ ne spertita konstituciigo de la ekvilibro de publikaj financoj, la plej alta stadio de malpolitikigo kaj novliberalisma revo de aŭtomata alĝustigo, deprenita de la suverena decidado, resendante ĉian oponon al la foraj normoj, plej altaj kaj nedemandeblaj de la Konstitucio.

La plej impona eco de la novliberalismo estas do certe ĝia kapablo nutri siajn antaŭenirojn per siaj propraj malvenoj. Kaj la eŭropaj pintkunvenoj estas la plej bona loko de tiu transformado – kies finon ni verŝajne ankoraŭ ne vidis. Ĉar la malabundo mem, akiraĵo tamen tiel rimarkinda kiel nerenversebla (nur infana kredemulo povus opini ĝin transira kaj limigita al «malbona momenta travivaĵo»), la malabundo do trafos la saman katastrofan sorton kiel la antaŭaj liberalismaj eltrovaĵoj... kaj la saman gloran preterpason. Ĉi-foje ja, konservante tion, kio estis rikoltita, necesas ŝanĝi la terenon, ĉar la toksa kontraŭproduktiveco de la kunordigitaj eŭropaj malabundoj estas nun tro videbla.

Videbla ĝi estas de la investistoj, kiuj postulas ion kaj ties malon – buĝetan disciplinon kaj kreskon... metode mortigitan de la buĝeta disciplino. Videbla ĝi ekestas de la registaroj mem, nur postsekvantaj la merkatojn kaj okupataj laŭeble sekvi la movojn de iliaj sinsekvaj ordonoj. Videbla ĝi estas, kaj ĉi-foje pli serioze, de la Internacia Mon-Fonduso (IMF), kiu komencas ekkonscii, ke la malabundo mortigas la revenon de kresko⁶ (kaj s-ino Christine Lagarde mem ŝajnas nun dubi pri la sinkretismaj kapabloj de la «rilance»⁷), aŭ de la Eŭropa Komisiono, kies kresko-prognozoj montras la efikon de la anoncata katastrofo. La kresko de la Eŭrop-Unio estas reviziita por 2012 de 1,75 % ĝis 0,5 %.⁸ Britujo, por 2011, pasas de 1,7 % al 0,7 %, por 2012 de 2,5 % (!) al 0,6 %. Francujo revizias la proprajn prognozojn: de 1,75 % ĝis 1 %. Eĉ Germanujo ekkonsciigas finfine, ke oni ne povas pretervivi sola meze de oceano da falintoj – des pli se oni fanfaronas pri sia kresko-modelo tirata de eksportaĵoj... 2012 ne estos je 1,8 % kiel antaŭvidita, sed je 1 %, diris la germana registaro, kaj eĉ pli verŝajne 0,8 % laŭ la sendependaj institutoj.

povo». Kaj jen kiel la sakstrato de malabundo proponas propran elirejon: se rigoro montriĝas katastrofa el la vidpunkto mem de siaj anoncataj celoj (redukto de la deficitaj), nenio malhelpas aldoni al ĝi la strategion de kresko-relanĉo pere de konkurenco – tio estas per reduktado de la tuta kosto de laboro (tio estas: la salajroj).

Oni do baldaŭ vidos – oni jam vidas – sin turni la paroladojn de la eŭropaj ekonomiaj politikoj por moderi la logikon de la simplaj ŝraŭbpremoj kaj, iom post iom ĝin anstataŭigi per la ideo de resalto helpe de la konkurencoj eksportaĵoj: la ŝrumpo de la interna postulo estas nun tro evidenta, la solvo venos do de la ekstera postulo. Renomita «interna devaluto» kun la zorgo pri vortoŝminkado kiu karakterizas nian epokon, ĉi tiu kopio de la «konkurenco-pova malinflacio» de la 1980-aj jaroj⁹ trafos saman malsukceson kiel sia originalo, pro almenaŭ du kialoj. Unue, se ĝi havus ian propran efikecon, ties profitoj aperus nur en la mezdaŭro (Germanujo bezonis unu jardekon da dolora salajro-malinflacio por rikolti sian nunan konkurenca avantaĝon), tio estas en tempo-horizonto tute ne kongrua kun la urĝeco de la kresko-reekfunkciado, sola efika rimedo por rapide redukti la rilaton ŝuldo/malneto enlanda produkto (MEP).

Sed la ideo mem, ke ĉiuj eŭropaj ŝtatoj adoptos samtempe ĉi tiun strategion ja plej certe destinas ĝin al neniigo, ĉar laŭkonstrue ĝi havas sencon nur unufanka! La konkurenca avantaĝo estas relativa donitaĵo: oni povas deziri konverti ĉiujn al la virta germana modelo, sed nur se oni forgesis, ke ĝia ĝeneraligo estas en si mem memdetrua. Restus do la salajra malabundo, aldoniĝinta al la buĝeta malabundo, kaj kroma ŝrumpo de la interna postulo, aldoniĝinta al la nekresko de la ekstera postulo, kia belega rezulto, ĉu ne? Sed ne gravas, finfine: ĉar la neefikeco de la novliberalismaj politikoj neniam estis sufiĉa kialo por ilin rifuzi, restas ĉiuj instituciaj konkeraĵoj ricevitaj intertempe, por kaŝi la evidenton de malsukceso, konkeraĵoj pri kiuj la pakto por la eŭro de marto 2011 jam montris la ĉefajn celojn – redukto de pensioj, faciligo de maldungoj, decentrigo de la salajro-intertraktado, detruoj de la protektaj statusoj (laborkontrakto kun nelimigita daŭro, publika

Nord-Kivuo. La Baraza – kiu signifas la diskut-arbon en la svahila – estis lanĉita en 1993 de la «Gandhi de la Nord-Kivuo»⁹ por malhelpi ke la urbo ekfajru. Kiam ĉiu estas sidanta, spaco estas tia, ke apenaŭ bonzaj-arbeto povus tie kreski. Malgraŭ ĉio, la estraranoj asertas sian pozicion kvazaŭ «la preĝejo meze de la vilaĝo». S-ro Deo Tusi Bikanaba, vicprezidanto de la Baraza la Wazee, opinias ke sekureco dum la elekta periodo estas plej grava defio: «Ni deziris informi la loĝantaron pri la praktiko de sia libera elekto. Pro tio, ke armitaj grupoj havas sian propran kandidaton, la aliaj kandidatoj ne havas aliron al iuj teritorioj. Ĉi tiuj elementoj ne estas regataj kaj ebligas al grupoj trudi kandidaton. Jen kial la konflikto-solvado kaj pacigo de la regiono estas tiom gravaj, kaj kial la Baraza ludas ĉefan rolon en la balota-procezo en Nord-Kivuo».

La problemoj aperis ekde la fazo «balot-listigo», tio estas la starigo de listo kaj eldonado de balotkartoj. La diferencoj inter la nombro de enskribitoj laŭ la provincoj dubigas la loĝantaron. La Landa Sendependa Balot-Komisiono (LSBK) nombris 32,02 milionojn da voĉdonantoj, kompare kun 25,7 milionoj kvin jarojn antaŭe, tio estas kresko de 25 %, pli ol la demografia kresko. Kaj la regionoj laŭfama favoraj al la nuna prezidanto havas la plej grandan kreskon... Krome, kiam la elektonto-registrilo estis publikigita, pli ol 119 941 neregulaĵoj estis konstatitaj de la asocio «Agi por elektoj travideblaj kaj pacaj» (AETP).¹⁰ Sed la lokaj Neregistaraj Organizaĵoj (NRO) ja ankaŭ favoris la enskribiĝojn. (Senluziigitaj de politiko naciskale, multaj konganoj ne plu volis balot-karton. La Nova Kongolanda Civila Socio (NKCS) [reto de asocioj por defendo de Homrajtoj] organizis lokan kampanjon por instigi homojn voĉdoni, rakontas s-ro Ganeli Nkngolo, kiu reprezentas la Komunon Kongan Fronton kontraŭ Balkanigo (KKFB) ene de la NKCS. Rezulte: Kinŝaso pasis de 2,5 milionoj da voĉdonantoj al 3,2 milionoj. Sen interveno de la civila socio, la proporcio de enskribiĝo estus tre malkreskinta».

Ĉi tiuj elektoj fariĝas loĝistika problemoj: la balotujoj venas de Germanujo, la izolŝeloj de libano, la balotaj necesajoj de Ĉinujo, la balotiloj de Sudafriko. Necesas poste dismeti ilin en 62.000 voĉdonejoj, sur teritorio samvasta kiel okcidenta Eŭropo, kun tre malmulte da aviadiloj kaj preskaŭ neekzistantaj vojoj.

Duboj pri la sendependeco de la balot-komisiono

EN MEMLING-HOTELO dum gazetara konferenco, s-ro Jérôme Bonso, prezidanto de la AETP, defendas la teknikan taksadon de la LSBK, kiun lia asocio ĵus faris. Lia fervoro de kvazaŭ foira paroladisto kontrastas kun la tro mallaŭta etoso de la kinŝaso-palaco. «Estas bone kredi, ke oni kapablas respekti la balotajn templimojn, sed la fido de pastro Daniel Mulunda Ngoy [prezidanto de la LSBK] ne sufiĉas. La LSBK estas kuiristino, de kiu oni ne tro postulu. La elektroĉesigoj kaj aliaj teknikaj problemoj kun fortaj efikoj ne estis konsiderataj. Se oni donas la bazaraĉetaĵojn tro malfrue al la kuiristino, la manĝo ne estos bongusta, aŭ ne preta akurate». Lia parolado efikas, dum la sendependeco de la institucio estas ankaŭ forte kontestata. S-ro Georges Tshionza, ĝenerala sekretario de la Servo por fortoj al la apogilojn al la bazaj komunumoj en Centra Afriko (Ceracob) konsentas kun tiuj rezervoj. Kreita en 1993, la Ceracob grupigas NRO-jn, kiuj progresigas (antaŭenigas) la teknikan fakecon de la asocio. «Ni jam avertis la LSBK, li substrekas, ke la elekta procezo, tia kia ĝis okazis, ne kondukos al akceptebla rezulto. La Nacia Asembleo, la Senato kaj la prezidanto respondecas pri tio. La LSBK devus konsisti el sendependaj personoj, sed kiam la civila socio proponis dek kvin kandidatojn vere sendependajn, ili estis rifuzataj». Jen amareco tiom stimula kiom kola-nukso por la aktivuloj de konstruata demokratio.

Ĉe la Eklezio de la Vekiĝo la Biblio estas kapitalo

TIU ĈI MOBILIZADO de la asocio estas nemalhavebla etapo por la redifino de la konga politika vivo kaj por la necesa lernado de la strebado al ĝenerala intereso, devojĝinta dum la diktaturaj jaroj. Iuj eĉ citas la «araban printempon» kiel inspir-fonton. «En 2006, memorigas pastro Malu Malu, la loĝantaro voĉdonis kvazaŭ turistoj, kaj estis konvinkita, ke post la elektoj ĉio ŝanĝiĝos. Ni nun komprenis, ke la demokratio vivo estas procezo, kiu funkcias antaŭ, dum kaj post la elektoj». Sed la sociaj urĝaj problemoj kaj la mankoj de la eduk-sistemo rezultigas formon de «politika anal-fabeteco», kiu pelas la loĝantaron al religiemo konsoliga, sekuriga kaj senrespondeciga.

La suburbo Bumbu, en Kinŝaso, ŝajnas metita sur subĉielan rubaĵejon. La kvazaŭ-stratoj estas baritaj de veturil-skeletoj forlasitaj al la malrapida forviŝo de senmovigita tempo, stagnanta same kiel la malfreŝa akvo, kiu ĝis en la domoj, estas parto de la familio. Ĉi tie elektro forestas, same kiel la ŝtato. Estas taŭga tereno por enplandado de entreprenoj de espero, tiaj kia la Eklezio de Vekiĝo, «Promesita Tero», kie la «granda profeto» Michée predikas en sia blua sapeista vestaĵo malantaŭ sia pupitro ornamita per falsaj relikvoj kaj plastaj floroj «made in China». Malgraŭ la elektro-paneo kaj manko de muziko, la pastro digne alvokas siajn parohanojn dormetantajn sub la varmega lada tegmento. Ankaŭ ĉi tie la elektoj enestas en la prediko. «Se la lando restos laika, ne povos esti pacaj balotoj. Ni preĝu por ĉi tiuj elektoj. Haleluja! La donaco estas ŝlosilo, kiu malfermas la pordon de la alianco kun Dio. Amen». La Eklezio de la vekigo estas lukra entrepreno, kie la Biblio estas kapitala rimedo. Ni ne trompiĝu: la profeto ne transformas akvon en vinon, kaj eĉ malpli, la donacojn en dividendojn. Neniu ĝenerala beno, sed personigitaj profetaĵoj, donitaj kontraŭ multaj pagoj, estas pruvo pri la videbla individuismo de la socio. «Eĉ en la familia sfero, ne plu ekzistas solidareco volontec-bazita», klarigas s-ro Meriaud, kiu vivas en DRK de tridek jaroj. Laŭ s-ro Michel Luntumbue, esploristo en la Grupo por Esploro kaj Informado pri paco kaj sekureco (GRIP), la kongolanda socio havas «emojn al fragmentiĝo kaj komunumismo, kiuj kontraŭas la formiĝon de sociaj movadoj kunordigitaj kaj longdaŭraj».¹¹

En la oficejo de la Nova Kongolanda Civila Socio (NKCS) en Kasa-Vubu, pli ol tri cent homoj aŭskultas la paroladon de la kunordiganto ellasita de laŭparolilo, kiu estis tro longdaŭre uzata. Ankaŭ ĉi tie, apud la stadiono de martiroj, la sonsistemo kaj la voĉo de la oratoro estas viktimoj de la elektro-malapero. Finfine, ĉu la celo de la lanĉota kampanjo pri civitana edukado de la NKCS ne estas kuraĝigi la civitanojn laŭtigi la voĉojn por esti aŭdataj de la politikuloj? Fronte al aŭskultantaro, kie estas kelkaj malmultaj deputito-kandidatoj kaj al unu soleca televidkamerao, s-ro Jonas Tshiombela anoncas sian refleksesblon: «Karaj gekandidatoj, nia balotilo favore al vi estas je tiu prezo. Ĉu vi tion sciis? La kongolanda popolo ne plu bezonas malplenajn paroladojn. Viaj T-ĉemizoj, bieroj kaj aliaj donacoj de nun ne plu logos nin. Vi estu avertitaj kaj alvokitaj. La loĝantaro atendas vian firman engaĝiĝon por liberaj, demokratiaj, travideblaj kaj pacaj elektoj».

La korupto-akuzoj kontraŭ parlamentanoj estas multaj. La gazetaro regule publike mallaŭdas tiujn, kiuj marĉandas sian voĉon. «Por voĉdonigi leĝon la registaro koruptas la deputitojn, estas skandalo», protestas s-ro Tshionza. Ne estas mirige do, ke la politikaj partioj kreskas kvazaŭ fungoj post pluvo, en malfacile regebla malordo. Se demokratio oni mezuras laŭ ilia nombro, DRK estus en la unuaj lokoj de la tutmonda klasifiko: ili nombras 417! Kaj ili ofte ekzistas nur dum la balotperiodo. Tiel, por la parlamentaj elektoj, la LSBK registris 18 386 kandidatojn por 500 sidlokoj. Tshangu-distrikto en Kinŝaso sola proponas 1 548 kandidatojn por 15 sidlokoj. S-ro Josiah Batabiha Bushoki, eksa provinca ministro de agrokulturo en Nord-Kivuo, havas propran interpretadon de la fenomeno: «Politiko estas merkato, kie estas dungeblecoj kun salajroj garantiataj de vi mem, ĉar la deputitoj ja decidas siajn proprajn salajrojn. Ĉiu volas iri al la sama manĝejo, sen iu ajn zorgo helpi la patrujon». La civila socio do prezentas sin kiel «popolamiko» por defendi la kolektivitan intereson fronte al aĉetebla gvidanta klaso.

«Jam en 1997, la kongolanda diasporo, kiu estis reveninta kun la intenco partopreni la regadon, montris sian malfortan flankon, akaparante la riĉofontojn. Oni nomis ĝin 'diasputrito', memoras s-ro Jean-Claude Mashini, vicdirektoro en la kabineto de la ĉefministro. Ĝi uzis la klasikajn armilojn de tribismo, sed, male al tio, kio okazas normale en la triboj, ĝi neniam redidonis la riĉaĵojn. Kiam s-ro Mashini akceptas nin en sia oficejo, li instaligas sur komforta kanapo kaj gardas ĉe si sian «pilgrim-bastonon», kiel li ŝatas nomi la sceptron, kiun li ricevis dum tradicia ceremonio. «Mi ricevis ĝin dum unu el miaj vizitoj en Bandundu, mia naskiĝ-regiono, li klarigas. Unu el la lokaj ĉefoj donis ĝin al mi. Estas esprimo de aliĝo de la loĝantaro al la povo, kiun ĝi simboligas. Oni rimarkigis al mi, ke ĉi tiu bastono, kiu memorigas mian originon, povus esti diskriminacia, sed estas precipe signo de aliĝo al valoroj. Same kiel la kravato kiun mi portas, ĝi estas ruĝa ĉar ĝi reprezentas mian politikan akordon».

La strebado al identeca ekvilibro naskis la tradicion de la registaroj «de nacia unueco», kiuj montriĝas foje malfortikaj. La etnaj identecoj estas ŝnuretoj facile manipuleblaj de la politikaj agantoj – ja formo de balota klientarismo. Voĉdono por «frato» klariĝas per la tre ofta sento, ke oni povas esti reprezentata nur per iu el sama origino. Krome, fronte al la ĉiutagaj malfacilaĵoj, oni provas scii, kion oni povos gajni per elekto de tiu ĉi aŭ tiu.

Plifortigi la civilan socion por rekonstrui la ŝtaton, ne por anstataŭi ĝin

TAMEN, ŝajnas ke la forta triba kunsignifado de voĉdono en DRK emas relativigi, fone de hezitantaciismo. Laŭdifine, la dek unu kandidatoj por la prezidanta elekto ne povas reprezenti la 365 tribojn, kiuj ekzistas en la lando. Krome kongolandanoj restas almuzuloj de propraj rajtoj. Tial, necesas ĉefe trovi «heroon, kiu kapablos defendi la landon, nutri la homojn kaj aŭdigi sin internacinele, klarigas la konga historiisto Jean-Marie Mutamba. Necesas Elombe [kuraĝulo en lingala] por purigi la stalojn de Augias».¹² Laŭ la politikologo Philippe Biyoya, la nunaj necertecoj «estas ligitaj al nia senprepara sendependiĝo. Sen demokratio kulturo, la kongolandanoj alprenis demokration. Ĉi tie oni estas refondanta same la ŝtaton kiel la socion, tiel ke ambaŭ ne povas renkontiĝi».

La reakordigo inter politiko kaj socio estis tamen unu el la ĉefaj temoj de la Konstitucio de 2006. Sed la lokaj elektoj, kiuj devus montri al la loĝantaro, ke la mastrumado de publikaj aĵoj rekte koncernas ilin, neniam okazis. Ili estas planataj okazi en marto aŭ aprilo 2013, sed la buĝeto ankoraŭ ne estas decidita.

Kvankam la suno levigas super Bukavu antaŭ ol veki Kinŝason, hodiaŭ tropika pluvo ŝvelas, kvazaŭ pitono satega pro engluto de ruinigita urbo. Senkompata, ĝi malliberigas per sia humida premo la preleĝojn, kie konvenis la agantoj de la civila socio de Sud-Kivuo. Pluvego frapadas la plastan tegmenton kaj, dum la debatoj pri sekureco dum elekto-periodo, la interŝanĝoj estas neaŭdeblaj. La debatgvidantino proponas kritiki dokumenton pri proponataj aktivaĵoj (forumo kun kandidatoj al deputado, socia dialogo pri la sekurigo de la elektoj, debato pri temo: «seksaj perfortaĵoj kaj alispecaj implikaĵoj kaj diskriminacioj pri kiuj virinoj suferas», ktp.). Sed, kiam la raportantoj eldiras siajn rekomendojn, la provinca kunordiganto de Sud-Kivuo, s-ro Charles Sadi Omari, el la societo Development Alternative Incorporated (DAI), aŭtoritate interrompas la diskuton. Li anoncas, ke ĉiuj tiuj aktivaĵoj estas jam organizataj interkonsente kun la LSBK, ke do ne eblas ilin modifi. Jen perdita labormateno, kontraŭ manĝo kaj ioma repago de vojaĝokosto. En sia raporto, DAI povos konfirmi al la financisto, kiu dungis ĝin (la brita kunlaborado, UK Aid), ke la civila socio ja estis konsultata. Plenumita kontrakto.

En la liberalismaj reformoj konsilitaj de la Bretton Woods-institucioj al la afrikaj landoj – kaj kiuj ricevis eĥon en la grandaj disvolvigo-agentoj – la civila socio estas tre ŝatata de la grandaj internaciaj financistoj, kiuj vidas en ĝi matricon de nova gvidkapablo (leadership). Ĝia kresko kontribuas al la malfortigo de

la ŝtataj suverenecoj. Apud la malcentralizoj, privatigoj kaj la enmiksiĝo de la helpoagantoj, ĝi estas, laŭ multaj observantoj, nova signo de bonfarta demokratio... Inter asocioj kaj financantoj nepre instaligas rilatoj de subordigo, eĉ foje dependeco, akritigitaj de inter-asocia konkurenco.

La kongolanda civila socio strebas, tre malfacile, modifi la praktikojn de la ŝtata aparato. Ne plu temas nur pri premgrupa strategio ĉe la registaroj, la subregionaj kaj internaciaj organizaĵoj, nek pri sociala anstataŭo de la publika potenco. Sed temas ekzemple pri rekta partnereco kun la registaro por ellabori redaktadon de leĝprojekto. «Ni ne plu estas (homoj, kiuj valorigas aliajn), konfirmas s-ro Tshionza. La civila socio ne laboras por malfortigi la ŝtaton, tute male: ĝi agas por ke la ŝtato rehavu sian ekziston. Ni ne prenas la novliberalismon, kiu proponas la Bretton Woods-instituciojn, kiel referencojn; ni volas redoni sencon al la ŝtato, tiel ke ĝi restariĝu».

¹ La 30-a de junio 1960 estas dato de sendependiĝo de la Belga Kongo.

² Komuna programo de la internacia Mon-Fonduso (IMF) kaj de la Monda Banko favore al la plej malriĉaj landoj, por la mastrumado de sia ŝuldo.

³ Vd prosper Nabirabo, «Fragile gestation de la démocratie en République Démocratique du Congo», *Le Monde diplomatique*, junio 2007.

⁴ Starigita en 2006 de s-ro Mo Ibrahim, riĉa financisto de la komunikadoj, la fondaĵo celas «plifortigi la kvaliton de gvidkapablo / gvidpozicio en Afriko».

⁵ La modifita artikolo 71 de la konstitucio tekstas: «La prezidanto de la respubliko estas elektita per simpla plimulto de la esprimitaj voĉoj».

⁶ Amber Peterman, Tia Palermo kaj Caryn Bredenkamp, «Estimates and determinants of sexual violence against women in the Democratic Republic of Congo», *American Journal of Public Health*, vol 101, n-ro 6, Vaŝingtono, DC, junio 2011.

⁷ Oficejo de la homhelpa kunordigado de la Unuiĝintaj Nacioj je la 31-a de marto 2011.

⁸ François Polet, «Les résistances africaines entre répressions et instrumentalisation», en *Etat des résistances dans le Sud. Afrique* (kolektiva), Centre tricontinental – Syllepse, kol. «Alternative Sud», Louvain-la-neuve – Parizo, 2010.

⁹ S-roj Josiah Batabiha Bushoki (Nyanga), Sinzi Kiramuka (kongana hutuo), Musumba Mathe (nande), Azile Tanzi (iturio) kaj Mpirikanya Forongo (kongana tucio).

¹⁰ Konfidencia raporto de la belga societo Zetes pensigas eĉ, ke 700 000 fikciaj elektontoj estis enskribitaj.

¹¹ Michel Luntumbue, «République Démocratique du Congo: une société en mouvement?», en *Etat des résistances dans le Sud. Afrique*, citita.

¹² Purigi la stalojn de Augias estas, laŭ la greka mitologio, unu el la dek du laboroj de Heraklo, kaj signifas grandegan purigadon –jmc.



CÉDRIC GERBEHAYE / De la serie «Congo in Limbo»

Multigo de la povocentroj. Kiu gajnis la militon en Libio ?

La libia Nacia Konsilio de Transigo (NKT) donis al si registaron kiu estas ne vere rekonata de la loĝantaro, kvankam certaj ribelaj ĉefoj estis nomumitaj ministroj. La rekonstruado de jurŝtato stumblas super la militizo de la socio, super la retiriĝo al klanaj kaj religiaj identiĝoj kaj super la interveno de eksterlandaj agantoj.

de PATRICK HAIMZADEH

DUM TIU ĈI 5-a de novembro, tago antaŭ la festo de la Aid Al-Adha (aŭ Aid Al-Kabir), la loĝantoj de Tripolo zorgas ĉefe pri serĉado de la ŝafo oferota konforme al la islama tradicio. Je la prezo de po 25 libiaj dinaroj (proksimume 15 eŭroj) por kilogramo, do la duoblo de la antaŭmilita prezo, multaj familioj povis akiri nur animalon el Turkio, malpli kosta, sed malpli aprezata. Kvankam la vivo ŝajnas esti normala dumtage, la noktoj estas multe pli malkvietaj, pro la regulaj incidentoj inter armitaj grupoj.

En la lastaj tagoj temas ĉefe pri disputoj inter armitaj loĝantoj de certaj kvartaloj kaj la *thouwar*¹ de la urbo Zintan, kies bataliono ludis decidan rolon en la preno de la ĉefurbo apud tiuj de Misrato, Tripolo kaj de aliaj urboj de okcidenta Libio (*Jefren, Jadu, Rujbane*). Kun iom pli ol mil ducent armitoj en Tripolo, la zintan-oj estas – post la foriro de la plej multaj elementoj de la bataliono de Misrato al la fronto de *Bani Walid*² kaj Sirto, kaj la reveno de la ceteraj batalionoj en siajn originajn urbojn – la plej grava militforto de la ĉefurbo. Konkerinte en aŭgusto, post tri tagoj da bataloj, la ĉirkaŭaĵojn de la internacia flughaveno de Tripolo, kiu inkludis la plej vastan rezidejon de Muamar Kadhafi kaj lian sekurec-batalionon, ili ricevis de la Nacia Konsilio de Transigo (NKT) la permeson regi la zonan de dudek kvin kilometroj da diametro ĉirkaŭ la flughaveno.

Ilia ĉefo, s-ro Mukhtar Al-Akhdar, estas mita kaj karisma persono de la ribelo de la *djebel Nefusa*. Ili partoprenis ĉiujn batalojn ekde la fino de marto. Antaŭ la milito li estis direktoro de malgranda entrepreno kiu luis veturilojn kun ŝoforo kaj laboris por la petrolaj societoj, kaj li ne havas alian militsperton ol tiun de sia militservo, en la 1980-aj jaroj, dum kiu li servis, kiel multaj junaj libianoj de lia generacio, en la militfortoj senditaj en la nordon de Ĉadio. S-ro Al-Akhdar konsideras sian mision alte grava, kaj li fieras klarigi ke la prezidanto de la NKT Mustafa Abdeljalil, kiu ĵus instaligis en la lokaloj de la eksa Universitato de Islama Alvoko, situanta en la zono de lia respondeco, konfidis al li persone la eksteran sekurigon de tiu tereno.

Kvankam la 7-a de novembro estas granda tago por li, kun la malfermo de la unua komerca aerlinio, kies unua flugo estis tiu de la kompanio *Turkish Airlines* el Istanbul, li estas tamen en zorgo ĉefe pro la incidentoj de la lasta nokto. Disputo inter *thouwar* de Zintano kaj junuloj de la kvartalo *Hay Al-Andalus* eksceligis, kaj fortigo de la du flankoj, kun *pick-up* kaj pezaj armiloj, rapide venis surloken, kaj li devis persone interveni ĉe la respondecoj de la militaj konsilioj de la kvartalo³ por eviti pli gravan alfrontiĝon.

Tiaj incidentoj, kiuj implikis ankaŭ la milicianojn de la memproklamita guberniestro de Tripolo kaj eksan ĝihadiston Abedelhakim Belhadj kaj kaŭzas viktimojn, multiĝis en la lastaj semajnoj. La *thouwar* de Zintano kristaligas nun la malkontenton de multaj tripolanoj, kiuj juĝas ilin sendisciplinaj kaj ŝtelistaj kaj opinias ke ili devus forlasi la urbon. S-ro Al-Akhdar rekonas izolitajn farojn: «*Miaj thouwar ne estas sanktuloj. Certaj incidentoj okazas ankaŭ pro konsumo de kontrabandita alkoholo, kiu pliiĝas en la ĉefurbo*». Li asertas, ke liaj kompaniaj komandantoj ricevis la ordonon fari sankciojn, se necese ekskludi la kaŭzintojn de tumultoj.

Nenia indulgo por la venkitoj

KELKAJN HOROJN poste, li iras, en la grandega parko ĉirkaŭanta la rezidejojn – bombitajn de la Nord-Atlantika Traktad-Organizaĵo (NATO) – kaj la tendojn de Kadhafi, al festo de la Organizaĵo por la Nacia Konkordo, kreita fine de aŭgusto de urba eminentulo.⁴ Virinoj kaj infanoj devenaj de Taurgha, Machachija kaj Gualich, kiuj, ĉe la falo de la reĝimo, devis fuĝi el siaj urboj kaj vilaĝoj subtenintaj Kadhafi-on, estis tien invitataj por kelkaj horoj da malstreĉiĝo. Ĉirkaŭ tradiciaj festpladoj la vidpunktoj de la membroj de la karitata organizaĵo, devenaj el la marbordaj urboj, kaj tiuj de la *thouwar*, malsamas. La unuaj asertas, ke la tempo venis por ke tiuj forlasu Tripolon kaj aliĝi al la nacia armeo. La duaj opinias, ke ili estas nemalhaveblaj por «sekurigi» la urbon, kaj ke la propagando kontraŭ ili estas farata de s-ro Belhaj.

Ili opinias ke ili gajnis la militon kaj do ne vidas kial ili devus meti sin sub la ordonon de generaloj de la nacia armeo, kiuj estas antaŭaj subtenantoj de la Kadhafi-reĝimo aŭ eksterlandaj kontraŭuloj. Laŭ s-ro Al-Akhdar, ĉio intertraktendas: gradoj, salajroj, pago por la ok monatoj da servo, dungo aŭ stipendio por studi por tiuj, kiuj ne deziras aliĝi al la armeo. Li ja intencas defendi la interesojn de siaj homoj kaj de sia tribo en la konkurso al potenco, influo kaj aliro al la resursoj (ĉefe petrolo), kiu aktuale okazas en la lando.

Ne penseblas forlasi Tripolon kaj lasi la vojon libera al s-ro Belhaj (kies trupoj ne nombras pli ol tricent homojn). Tiu lasta punkto estas interkonsenta ĉe ĉiuj venintoj, kiuj vidas en li ĝihadiston kiu aspiras al politika potenco, sen ajna loka subteno. Oni kromnomas lin la «viro kun stampilo», ĉar li laŭdire venis al Tripolo sen partopreni en ia ajn batalo, kun skipo de *Al-Jazira* kaj sia stampilo de milita guberniestro de Tripolo. Neniu deziras lian sektecan interpreton de islamo, kiun oni konsideras fremda al la lokaj tradicioj, nek lian protektanton, la emiron de Kataro, kiun oni akuzas je enmiksiĝo en la aferojn de la lando. S-ro Abedeljalil estas, male, de ĉiuj aprezata pro sia honesteco de laŭleĝa homo, pro sia aŭskultemo kaj sia afiŝita volo defendi la tradician kaj islaman identecon.

La nacia konkordo tamen ne ĉeestas. Malmultaj homoj interesiĝas pri la sorto de la loĝantoj de la vilaĝoj kaj urboj viktimaĵoj de represalioj pro sia subteno al la faligita reĝimo. Sur la vojoj, en la

urboj, la ĉasado al veturiloj registritaj en Sirto aŭ en Bani Walid estas sistema, iliaj pasaĝeroj kontrolataj, traserĉataj kaj kelkfoje senigataj je siaj havaĵoj. Rifuĝinta ĉe proksimumoj en sud-orienta kvartalo de Tripolo plejmulte priloga de la Ouarfalla – kaj kie aperas sur la muroj, ĉiunokte, skribaĵoj omaĝe al Kadhafi –, membro de la tribo Ouarfalla de Bani Walid atestas pri la prirabado de sia domo fare de la *thouwar* de Misrato en oktobro: «*Neniam ni forgesos. Ni atendas nian horon por venĝo*». Sen konsideri la suferojn de la venkitoj, nek rimedojn por protekti ilin, malfacilas kredi je la venonta realigo de la «nacia repaciĝo», kiun ĉiutage elvokas la politikaj respondecoj de la NKT, kiu disponas pri nenial reala povo super la batalionoj de la *thouwar*.

Ni veturas al la sud-okcidento direkte al Zintano. La unua traveturata urbo, Al-Azizija, estas la bastiono de la granda tribo de la Ouarchafana, kiuj pli aŭ malpli aktive subtenis la reĝimon de Kadhafi ĝis meze de aŭgusto kaj estas pro tio konsiderataj kiel ribeluloj lastmomentaj.⁵ Ekde kiam ni estas en la *djebel Nefoussa*, la vojo pasas ne malproksime de la du vilaĝoj de *Riyayna*, emblemaj por la disigaj linioj profundigitaj de la interna milito: tiu de Al-Riyayna Al-Charqiyya (Riyayna-Orienta) subtenis Kadhafi-on ĝis la fino. Tiu estas nun fantoma vilaĝo – domoj bruligitaj, pordoj detruitaj, vendejoj prirabataj –, dum ĝia najbara vilaĝo rehavas normalan aktivecon. La sloganoj glorantaj la Zintan-ojn estas ĉie videblaj, urĝe pentritaj kaj ofte nur malbone kovrantaj tiujn kiuj gloras la tribojn hodiaŭ venkitajn.

Fine aperas la urbo Zintano, staranta super la regiono. Tie estas la sidejo de la milit-konsilio de la regiono Okcidento, kiu ludis gravan rolon de kunordigado de la operacioj en la *djebel Nefoussa* kaj preparis la ofensivon al la ĉefurbo. Inter proksimume tridek kvin mil loĝantoj la urbo nombras pli ol tri mil *thouwar*, do la plej altan kvoton de militiziĝo en Libio. Laŭ s-ro Al-Akhdar proksimume mil okcent zintanaj *thouwar* estas dismetitaj en la sep plej gravaj petrol-terenoj de la regiono, kaj en *Ubari*, kie ili aktuale intertraktas pri la senarmigo de la tuaregoj. En *Bergen*, ne malproksima de *Oubari*, la zintanoj kaptis, la 20-an de novembro, s-ron Saif-Al Islam Kadhafi, kiun ili kondukis en sian bastionon. Ili tenas lin sub sia protekto kaj rifuzas, por la momento, liveri lin al la NKT.

«*Ni ne povas konkuri kun Misrato, kiu, por loĝantaro de tricent mil loĝantoj, disponas pri pli ol dek du mil thouwar, sed ni havas malsamajn zorgojn. Ekz-e ni ne deziris akompani ĝiajn homojn por sieĝi kaj ataki Bani Walid. Ni deziras konservi bonajn rilatojn kun la Ouarfalla, kun kiuj ligas nin longa tradicio de aliancoj kaj de bona najbareco. Por la loĝantoj de Misrato temis ĉefe pri venĝi sian urbon sieĝitan de la Ouarfalla, kun kiuj ilia rivaleco estas malnova. Koncerne la protekton de la petrolputoj, ni estis plej bone kapablaj certigi ĝin, ĉar nia tradicio estas beduena kaj ni bone konas la dezertajn regionojn ĝis Oubari. La aliaj loĝantoj de Tripolo ne kapricas iri tien*».

Kiam oni aŭdas tiujn paroladojn, malfacilas ne pensi pri la tradicia distingo farita de la historiisto Ibn Khaldun (1332-1406) inter la valoroj de la beduenoj (badu) kaj tiuj de la urbanoj (hadar). Ekz-e la zintanoj perceptas la tripolanojn kiel submetiĝemaj, hipokritaj kaj karierismaj (*moutasalliq*)⁶ kaj difinas sin mem kiel liberaj, kuraĝaj kaj sinceraj. La tripolanoj siavice respektas la kuraĝon kaj la solida-

recon de siaj najbaroj, sed opinias, ke iliaj valoroj kaj iliaj moroj ne estas adapteblaj al la urba vivo post reveno de la paco.

Almenaŭ same kiel la ĉeesto de la armiloj, do la militizado de la mensoj kaj la retiriĝo en la primarajn identecojn⁷ estas kaŭzoj de la pli oftaj armitaj alfrontiĝoj. Kompreneble, la lokaj respondecoj rifuzas nomi tiujn klanajn konfliktojn tiaj, kaj preferas paroli pri izolitaj incidentoj, kiujn ili atribuas al mistera «kvina kolono» aŭ al «dormantaj kadhafismaj ĉeloj» celantaj propagandi la dividon (*fitna*) sine de la «libia popolo». La oficiala diskurso, resumita en la slogano «Ne al tribismo, ne al regionismo», kiu antaŭ nelonge aperis sur multaj flagrubandoj kaj afiĉoj de la ĉefurbo, havas ĉiajn ecojn de pia deziro fora de la realo.⁸

Protekti la civilulojn, diris ili

En la ĉefurbo, s-ro Belhaj scias, ke li disponas pri la apogo de Kataro kaj pri la informila subteno de *Al-Jazira*, kaj pri homoj ideologie formitaj kaj disciplinitaj. Ili povus esti tentata prezenti sin kiel rimedo kontraŭ la «nedisciplinitaj» beduenoj, tiel riskante sekvigi ties reagon kaj flamiĝon de perforto. Fine, la venĝemo de la triboj kaj regionoj venkitaj kaj humiligataj de la ribeluloj pro ilia subteno al la reĝimo de Kadhafi povus montriĝi per pli kaj pli brutalaj agadoj.

Post ok monatoj da konflikto, kiun la okcidentaj respondecoj daŭre rifuzas kvalifiki interna milito, la protekto de la loĝantaroj, la motivo por kiu ili argumentis la ekmliton de la NATO, estas do tute ne garantiata. La triumfismo de la ĉefoj de la koalicio, kiuj gratulas sin pro «sia» venko post la dispredado de Sirto kaj la morto de Kadhafi, rivelas ilian profundan indiferenton pri la «libia popolo», kiun ili asertis protekti per siaj bomboj. La malboniĝo de la sekureca situacio kaj la plioftiĝo de armitaj alfrontiĝoj en Tripolio povas tamen rapide memori al ili, ke milita venko en interna milito signifas nenion per si mem kaj neniakaze signifas garantian «protekti la loĝantarojn».

¹ *Thouwar* estas la pluralo de *thair*, kiu signifas «revoluciuo». Ĝi signas membrojn de la batalionoj (*katiba*), kiuj batalis kontraŭ la reĝimo de Muamar Kadhafi.

² *Bani Walid* estas la bastiono de la tribo Ouarfalla, la plej granda de Tripolio [Tripolitiano], kiu plejparte subtenis Kadhafi-on.

³ Aktuale ekzistas oficiale kvindek tri kvartalaj milit-konsilioj en Tripolo.


⁴ Tiu organizaĵo nombras jam pli ol kvin mil membrojn.

⁵ De la 10-a ĝis la 12-a de novembro okazis bataloj per pezaj armiloj de la Ouarchafana kontraŭ milicianoj de la marborda urbo *Zaouia*, kiuj kaŭzis almenaŭ dek sep mortintojn kaj plurajn dekojn da vunditoj.

⁶ La uzata araba vorto estus laŭvorte tradukebla per «tiu kiu grimpas».

⁷ La gravaj urboj de la revolucio disponas nun ĉiu pri sia gazeto kaj pri sia televidstacio (dek kvar ĉenoj por la tuta lando). Same kiel la grandaj triboj, ili havas ankaŭ ĉiuj sian paĝon Facebook.

⁸ Unu el la antaŭrangaj celoj de la junaj «liberaj oficiroj» gvidataj de Kadhafi post la revolucio de 1969 estis jam la oficiala forigo de la tribismo. Oni faris konkretajn dispojn en tiu senco. Ĉar ili estis malmulte efikaj, ili daŭris nur kelkajn jarojn, antaŭ ol Kadhafi faris denove la tribojn unu el la leviloj de sia potenco. Vd «Libye, les conditions de l'unité nationale [Libio, la kondiĉoj de la nacia unueco]», *Le Monde diplomatique*, septembro 2011.



Voĉoj de la tempo

Eduardo Galeano, urugvaja civitano, estas unu el la plej famaj nuntempaj latinamerikaj verkistoj. Samtempe ĵurnalisto kaj poeto, rakontisto kaj historiisto, li deponas ĉi tie siajn skeĉojn de forgesita ordinareco kaj memorigas, ke eta historio kelkfoje diras la samon kiel longa analizo.

de EDUARDO GALEANO

Eduardo GALEANO, urugvaja verkisto. Tiu ĉi teksto estas eltiraĵo el lia lasta verko tradukita al la franca: *Les Voix du temps*, Lux, Montrealo, 2011.

La suno

Ie en Pensilvanio, Anne Merak laboras kiel asistento de la suno. Tiom longe, kiom ŝi memoras, ŝi ĉiam okupis tiun postenon. Ĉiumatene, Anne levis la brakojn kaj puŝis la sunon por ke ĝi leviĝu en la ĉielon; kaj ĉiuvespere, ŝi mallevis la brakojn por kuŝigi ĝin ĉe la horizonto. Ŝi estis tute eta, kiam ŝi alprenis tiun taskon, kaj ŝi neniam neglektis ĝin. Antaŭ duona jarcento oni deklaris ŝin freneza. De tiam, Anne pasis tra pluraj aziloj, ĝi estis traktata de multnombraj psĥiatroj kaj glutadis eksterordinarajn kvantojn de piloloj. Ili neniam povis sanigi ŝin. Bonŝance.

La modela bankisto

John Pierpont Morgan estis proprieto de la plej potenca banko de la mondo kaj de okdek ok kromaj entreprenoj. Ĉar li estis homo tre okupata, li forgesis pagi siajn impostojn. Li estis nenion deklaranta de tri jaroj, ekde la krizo de 1929. Tiu novaĵo vekis la koleron de la amasojn ruinigitaj de la bankroto de *Wall Street* kaj kaŭzis nacinivelan skandalon. Por senigi sin de sia fifamo kiel rabema bankisto, la aferisto mendis la servon de la respondeculo pri publikaj rilatoj de la cirko *Ringling Brothers*. Tiu fakulo konsilis al li angaĝi naturan fenomenon, Lya Graf, 30-jarulinon kiu mezuris sesdek ok centimetrojn, sed kies vizaĝo kaj korpo havis neniom de nano. Do, oni lanĉis grandan reklam-kampanjon, kies pinta arango estis foto kiu montris la bankiston sidanta sur trono kun vizaĝo de bona familia patro, tenante la miniaturan virinon sur siaj genuoj. La ideo estis, ke li reprezentu la financon povon kiu protektas la popolon mizerigitan de la krizo. Tio estis fiasko.

Leciono pri medicino

En leciono pri intensa terapio, en Bonaero, Rubén Omar Sosa esploris la kazon de Maksimiliana, la plej grava leciono de ĉiuj liaj studjaroj. Profesoro priskribis la situacion: s-ino Maksimiliana, elĉerpita post tuta vivo pasigita sen dimanĉoj, antaŭ kelka tempo venis en malsanulejon, kaj ĉiutage ŝi petis la samon : – *Bonvolu, doktoro, ĉu vi povus kontroli mian pulson?* Post iometa premo sur ĉia manartiko la kuracisto diris: – *Ĝi estas tre bona. Sepdek ok. Perfekta.* – *Ho, dankon, doktoro. Kaj nun, ĉu vi povus kontroli mian pulson, bonvolu ?* Kaj la kuracisto kontrolis ŝian pulson kroman fojon kaj klarigis al ŝi denove, ke ĉio estas en bona ordo kaj ke tio ne povas esti pli bona. La sceno ripetigis ĉiutage. Ĉiufoje kiam li pasis ĉe la ĉambro de s-ino Maksimiliana, tiu raŭka voĉeto vokis lin kaj streĉis al li sian brakon, kvazaŭ branĉeton, re kaj ree. Li obeis, ĉar bona kuracisto devas esti pacienca kun siaj pacientoj, sed li diris al si: *Tiu maljunulino estas iom teda*, kaj li pensis: *Ŝi bezonas bolton*. Nur jarojn poste li komprenis, ke ŝi petis nur ke iu ŝin tuŝu.

La vortoj

En la ĝangalo de Alta Paranao, kamionisto rekomendis al mi esti prudenta:

– *Atentu la sovaĝulojn. Estas ankoraŭ kelkaj da ili en libereco ĉi tie. Bonŝance ne multaj. Oni komencis enfermi ilin en bestĝardenoj.*

Li parolis al mi en la hispana. Sed tiu ne estis la lingvo kiun li parolis ĉiutage. La kamionisto parolis la gvaranian, la lingvon de ĝuste tiuj sovaĝuloj, kiujn li timis kaj malestimis. Strange, en Paragvajo oni parolas la lingvon de la venkitoj. Eĉ pli strange, la venkitoj kredas, daŭre kredas, ke la vortoj estas sanktaj. La vortoj, kiu mensogas, ofendas tion kion ili nomas, sed tiuj, kiu diras vere, rivelas la animon de la aĵoj. La venkitoj asertas, ke la animo sidas en la vortoj kiuj diras ĝin. Se mi donas al vi miajn vortojn, mi donas min. La lingvo ne estas rubejo.

La tutmonda merkato

Arboj kanelkoloraj, fruktoj oraj. Mahagonaj manoj pakas blankajn grajnoj en grandajn verdajn foliojn. La grajnoj fermentas en la suno. Poste, elpakitaj, en la libera aero, la suno sekigas ilin kaj donas al ili iom post iom koloron kupran. Tiam la kakao ekvojaĝas sur la blua maro. Por pasi de la manoj kiuj kulturigas ĝin al la buŝoj kiuj manĝas ĝin, la kakao traktiĝas en la fabrikoj de *Cadbury*, *Mars*, *Nestlé* aŭ *Hershey's*, poste estas vendata en la superbazaroj de la mondo: por ĉiu dolaro, kiu eniras la kason, tri centonoj kaj duono venas ĝis la vilaĝo de kie venas la kakao. Richard Swift, toronta ĵurnalisto, vojaĝis al Ganao, en unu el tiuj vilaĝoj. Li vizitis la plantejojn. Kiam li eksidis por ripozi, li elprenis briketojn de ĉokolado, kaj eĉ antaŭ ol povi mordi en iun, amaso da sciemaj infanoj premiĝis ĉirkaŭ li. Ili estis neniam gustumintaj ion tian. Ili trovis tion tre bongusta.

La naskiĝo


En la publika malsanulejo en la plej riĉa kvartalo de Rio-de-Ĵaneiro oni prizorgis ĉiutage po milon da pacientoj, preskaŭ ĉiuj malriĉaj aŭ tre malriĉaj. Deĵoranta kuracisto rakontis la jenon al Juan Bedoian: – *Lastan semajnon mi devis elekti inter du knabinetoj ĵus naskitaj. Ĉi tie estas unu sola spirilo. Ili alvenis samtempe, mortontaj, kaj mi devis decidi, kiu el la du vivos.* *Ne estas mia tasko elekti, pensis la kuracisto, tio decidu Dio.* Sed Dio eĉ ne vorton sufloris. Kia ajn estis lia decido, la kuracisto faris krimon. Se li farintus nenion, li krimus double. Ne estis la momento por heziti. La etuloj estis ĉe la sojlo de la morto, ili jam komencis forlasi tiun ĉi mondon. La kuracisto fermis la okulojn. Unu el ili estis kondamnita je morto, la alia je vivo.

Manlaboristo

Mohammed Aŝraf ne iras al lernejo. De mateniĝo ĝis leviĝo de la luno li tranĉas, distranĉas, boras, muntas kaj kudras la piedpilkajn kiuj eliras el la pakistana vilaĝo *Umarkot* kaj ruliĝas al la stadioj de la tuta mondo. Mohammed havas 11 jarojn. Li faras tiun laboron ekde 5-jaraĝa. Se li sciis legi, kaj se li sciis legi la anglan, li komprenus tion kio estas skribita sur la etiketoj kiun li alĝuas al ĉiu de siaj faritaĵoj: *Tiu ĉi pilko ne estas farita de infanoj.*

Kontraŭflue

La ideoj de la semajngazeto *Marcha* tendencis al malprofito, sed la financoj de la gazeto siavice estis plene en ĝi. Hugo Alfaro, kiu, krom esti ĵurnalisto, funkciis kiel afergvidanto kaj havis la malsanigan taskon pagi la fakturojn, saltis pro ĝojo nur je kelkaj tre maloftaj okazoj: – *Jen, ni havas ion por pagi la venontan numeron!* La reklamspaco estis vendita. Dum la tuta longa historio universala de la sendependa ĵurnalismo, oni festis tian miraklon kiel pruvon ke Dio ekzistas. Male, Carlos Quijano, la direktoro, paliĝis. Kia hororo: ne ekzistis pli malbona novaĵo ol tiu bona novaĵo. Se ekzistis reklamo, tiam necesis oferi al ĝi paĝon aŭ eĉ plurajn paĝojn, kaj ĉiu peceto de paĝo estis spaco sankta kaj esenca por kontesti la certecojn, faligi la maskojn, skui la kverelojn kaj certiĝi ke morgaŭ ne estis simple nur alia nomo por hodiaŭ.



MARCELO MENDIZABAL «De la Serie «Enredos y desenredos» (Embroulements et demouements), 2007

La militista diktatoreco, kiu ekfuriozis en Urugvajo, ĉesis tridek kvar jarojn da ekzisto de *Marcha*, same kiel kelkajn aliajn gazetojn.

La malliberejo

En 1984, Luis Niño inspektis la malliberejojn de *Lurigancho* en Limo nome de organismo de defendo de la homrajtoj. Li enprofundiĝis en tiuj amasigitaj solecoj kaj provis, laŭ la eblecoj, tratabi al si vojon inter la malliberuloj nudaj aŭ vestitaj per ĉifonoj. Poste le petis paroli kun la direktoro de la malliberejo. Ĉar tiu forestis, akceptis lin la ĉefo de la sanservoj. Luis klarigis, ke li vidis malliberulojn mortantajn, vomis sangon, ke multaj el ili ardis je febro kaj estis ronĝitaj de vundoj, sed ke li miris vidante eĉ ne unu kuraciston. La ĉefo klarigis al li: – *Ni, la kuracistoj, intervenas nur kiam la flegistoj vokas nin.* – *Kaj kie estas la flegistoj?* – *Ni ne havas buĝeton por dungi ilin.*

La atakita atakanto

En Latinameriko la militistaj reĝimoj forbruligis la subfosajn librojn. En la demokratioj de hodiaŭ oni forbruligas la librojn de librotendado. La militistaj diktatorecoj malaperigis homojn. La financaj diktatorecoj malaperigas monon. Iun tagon, la bankoj de Argentino rifuzis redoni al siaj klientoj ties monon. Norberto Roglich estis metinta ĉiujn siajn ŝparaĵojn en la bankon por eviti ke la ratoj ronĝu ilin aŭ ke la ŝtelistoj ŝtelu ilin. Kiam li estis priŝtelita de la banko, s-ro Norberto estis tre malsana, ĉar la jaroj de la aĝo venas neniam solaj kaj lia pensio ne sufiĉis por pagi la medikamentojn. Li ne havis elekton: malespere li eniris la financon fortikaĵon kaj, sen peti ies ajn permeson, li trabatis al si la vojon ĝis la oficejo de la afergvidanto. En sia pugno li tenis granaton: [– Vi redonas al mi mian monon aŭ mi eksplodigos nin ĉiujn! La granato estis el plasto, sed ĝi faris la miraklon: la banko redonis al li lian monon. Poste, oni metis lin en malliberejojn. La prokuroro postulis dek ses jarojn da malliberejo. Por Norberto, ne por la banko.

La tutmonda informado

Kelkajn monatojn post la falo de la turoj, Israelo bombis Jeninon. El la tendaro de palestinaj rifuĝintoj restis nur giganta truo plena de mortintoj dispremitaj de la ruinaĵoj. La kratero de Jenino estis same profunda kiel tiu de la novjorkaj turoj. Tamen, krom la supervivantoj, kiuj traserĉis la ruinaĵojn por retrovi siajn proksimulojn, kiu vidis ĝin?

Fabrikoj

Ni estis en la jaro 1964 kaj la hidro de internacia komunismo malfermegis siajn sep faŭkojn por forvori Ĉilion. La publika opinio estis bombata de bildoj de brulantaj preĝejoj, de koncentrejoj, de rusaj tankoj, de la berlina muro meze de Santjago kaj de plenbarbaj gerilanoj kiuj forkonduis infanojn. Okazis elektoj. La timo triumfis, kaj Salvador Allende estis venkita. Dum tiuj doloraj momentoj mi demandis lin, kio pleje vundis lin. Allende rakontis al mi, kio okazis ĝuste apude, en domo de la kvartalo *Providencia*. Virino kiu laboregis kiel kuiristino, dommastrino kaj vartistino interŝange kun magra salajro, estis metinta ĉiujn siajn vestaĵojn en platan sakon kiun ŝi enterigis en la ĝardeno de siaj mastroj por ke la malamikoj de la privata proprieto ne forprenu ilin.

Klimataj urĝaĵoj

de IGNACIO RAMONET

La grava financa krizo kaj la ekonomia hororo, kiujn travivas la eŭropaj socioj, forgesigas pri tio, ke – kiel memorigis en decembro 2011 la Pintkunveno pri Klimato en Durban, Sudafriko – la klimatŝanĝo kaj la detruo de la biodiverseco estas plu la ĉefaj danĝeroj minacantaj la homaron. Se ni ne rapide ŝanĝas la superregantan produktad-sistemon altrudatan de la ekonomia tutmondiĝo, ni atingos la senrevenan punkton, post kiu la homa vivo sur la planedo iom post iom ĉesos esti eltenebla.

Antaŭ kelkaj semajnoj Unuiĝintaj Nacioj anoncis la naskiĝon de la 7-miliarda homo, filipina knabineto nomata Dánica. En iom pli ol 50 jaroj la nombro da teranoj obliĝis per 3,5, kaj la plejmulto

loĝas nun en urboj. Unuafoje en la historio kamparanoj nombras malpli ol urbanoj. Dume, la resursoj de la planedo ne pliiĝas kaj estiĝas nova geopolitika zorgo: kio okazos, kiam eĉ pli malabundiĝos kelkaj naturaj resursoj? Ni malkovras kun miro, ke nia «larĝa mondo» havas finon...

Laŭlonge de la lasta jardeko, dank' al la kreskado de kelkaj sojloj, la nombro da personoj eskapintaj el malriĉo kaj enirintaj la konsumsacion superas 150 milionojn...¹ Kiel oni povus ne ĝoji pri tio? Ne ekzistas pli justa afero en la mondo ol batalado kontraŭ malriĉo. Sed tio kunportas grandan respondecon por ĉiuj, ĉar tia situacio ne estas akordigebla kun la superreganta konsumad-sistemo.

Estas evidente, ke nia planedo ne disponas sufiĉajn naturajn aŭ energiajn resursojn uzeblajn senbride de la tuta monda loĝantaro. Por ke sep miliardoj da homoj konsumu tiom kiom averaĝa eŭropano, necesus la resursoj de du planedoj kiel

Tero. Kaj por konsumi tiom kiom averaĝa usonano, la resursoj de tri planedoj.

De la komenco de la 20a jarcento, ekzemple, la monda loĝantaro obliĝis per 4. Dum tiu sama periodo la karbo-konsumo obliĝis per 6, tiu de kupro per 25... De 1950 ĝis hodiaŭ la konsumo de metaloj ĝenerale obliĝis per 7... Tiu de plasto, per 18... Tiu de aluminio, per 20... Unuiĝintaj Nacioj jam delonge avertas nin, ke ni foruzas «pli ol 30 % de la reproviz-kapablo» de la tera biosfero. Moralinstruo: ni devas ekpensi pri alprenado kaj ĝeneraligo de multe pli sobraj kaj ŝparemaj viv-stiloj.

Ĉi tiu konsilo ŝajnas aparteni al la komuna saĝo, sed estas evidente, ke ĝi ne aplikiga al la unu miliardo da malsatadantoj en la mondo, nek al la tri miliardoj da malriĉuloj. La bombo de malriĉo minacas la homaron. La enorma breĉo disiganta la riĉulojn disde la malriĉuloj estas plu, malgraŭ la freŝaj progresoj, unu el la ĉefaj trajtoj de la nuna mondo.²

Ne temas pri abstrakta aserto: ĝi tre klare konkretiĝas. Ekz-e., dum legado de ĉi tiu artikolo (ĉ. 10 minutojn), 10 virinoj tra la mondo mortos dum naskado, kaj 210 infanoj malpli ol 5-jaraj mortos pro sanproblemoj facile kuraceblaj (el ili, 100 pro trinkado de malbonkvalita akvo). Ĉi tiuj personoj ne mortas pro malsano: ili mortas, ĉar ili estas malriĉaj. La malriĉo mortigas ilin. Dume, la helpo de Usono al la evoluantaj landoj malpliigis en la lastaj 15 jaroj je 25 %... Kaj en la mondo oni plu elspezas ĉ. 500 miliardojn da eŭroj jare por armiloj...

Se en la venontaj jardekoj ni devus pliigi je 70 % la produktadon de nutraĵoj por kovri la logikan mendadon de pli multnombra loĝantaro, la ekologiaj sekvoj estus neniigaj. Krome, tiu kresko eĉ ne estus daŭrigebla, ĉar ĝi implicus malboniĝon de la grundoj, pli grandan dezertiĝon de teritorioj, malpli da trinkakvo, pli rapidan detruon de la biodiverseco... Se ne paroli pri la

produktado de forcej-efikaj gasoj kaj ties gravaj konsekvencoj por la klimatsanĝo.

Ĉi-rilate indas rememorigi, ke ĉ. 1,5 miliardoj da homoj plu uzas poluajn mineralajn brulaĵojn kiel lignon, karbon, gason aŭ petrolon, ĉefe en Afriko, Ĉinio kaj Hindio. Apenaŭ 13 % de la monda energio estas renovigeblaj kaj puraj (energioj hidraŭlika, eola, suna, ktp.) La cetero estas atomdevena kaj precipe minerala, la plej damaĝa al la medio.

Ĉi-kuntekste zorgigas, ke la grandaj sojlolandoj alprenas detruajn, industriismajn kaj elfosemajn kresko-metodojn, tiel imitante la plej malbonan agmanieron, intan kaj antan, de la nunaj evoluintaj landoj. Ĉio tio fortege erodas la biodiversecon.

Kio estas la biodiverseco? La tuto de ĉiuj variaĵoj de ĉio vivanta. Ni konstata masan estingiĝon de plantaj kaj bestaj specioj, unu el la plej brutalaj kaj rapidaj estingiĝoj iam ajn okazintaj en la Tero. Ĉiujare malaperas inter 17 000 kaj 100 000 vivantaj specioj. Freŝa studo montras, ke 30 % el la maraj specioj troviĝas rade de estingiĝo pro troa fiŝado kaj klimatsanĝo. Ankaŭ unu el ok plantaj specioj estas minacata. Kvinono el ĉiuj vivantaj specioj povus formorti ĝis la jaro 2050.

Kiam estingiĝas unu specio, la ĉeno de la vivantaro modifiĝas kaj do ŝanĝiĝas la vojo de la naturhistorio. Tio samsignifas kiel atenco kontraŭ la libero de la naturo. Defendi la biodiversecon estas, sekve, defendi la objektivan solidarecon inter ĉiuj vivantaj estaĵoj.

La homo kaj lia neniiga produktad-sistemo estas la ĉefaj kaŭzoj de tiu detruo de la biodiverseco. En la lastaj tri jardekoj la eksceso de la novliberala tutmondigo rapidigis la fenomenon.

La tutmondigo favoras la aperon de monda sistemo regata de ekonomia hororo, en kiu la financerkatoj kaj la grandaj entreprenoj reenkondukis la leĝon de la ĝangalo, la leĝon de la plej forta. Temas pri mondo, en kiu la dezirego de profito pravigas ĉion, kiam ajn granda la kosto por la homoj aŭ la medio. Ĉi-rilate la tutmondigo favoras la disrabadon de la planedo. Multaj grandaj entreprenoj sturmas la naturon per ekstermezuraj deturimedoj. Kaj ili akiras enormajn profitojn poluante, tute senrespondece, la akvon, la aeron, la arbarojn, la riverojn, la subgrundon, la oceanojn... Kiuj estas ja propraĵoj de la homaro.

Kiel bremsi tian disrabadon de Tero? Ekzistas solvoj. Jen kvar urĝaj decidoj preneblaj: — ŝanĝi la sistemon sub la inspiro de la «solidareca ekonomio». Tia ekonomio kreas socian ŝultr-al-ŝultriĝon, ĉar la profitojn ĝuas ne nur kelkaj, sed ĉiuj. Temas pri ekonomia sistemo produktanta riĉecon sen detruo la planedon, sen ekspluati laboristojn, sen diskriminacii virinojn, sen ignori socialajn leĝojn;

— bremsi la tutmondigon revenante al reguligado korektanta la malican kaj nocan koncepton de libera komercado. Oni devas aŭdaci restarigi certan gradon de selektema protektismo (ekologia kaj sociala) por antaŭenpuŝi la maltutmondigon; — bremsi la frenezan financerspekuladon postulantantan neakcepteblajn sinoferojn al tutaj socioj, kiel ni konstata nuntempe en Eŭropo, kie la merkatoj alprenis la povon. Estas pli urĝe ol iam trudi imposton super la financaj transakcioj por ĉesigi la ekscesojn de borsa spekulado;

— se ni volas savi la planedon, eviti la klimatsanĝon kaj defendi la homaron, urĝas forlasi la koncepton de konstanta kreskado, kiu estas neeltenebla, kaj finfine suriri la vojon de akceptebla kreskado.

Se oni aplikus tiujn kvar simplajn rimedojn, esper-lumo finfine aperus en la horizonto, kaj la socioj komencus rehavi fidon pri la progreso. Sed kiu havos la politikan volon trudi ilin?



Diego Rivera «Frutas de la tierra» (Fruits de la terre), 1926–1927

¹ En Latinameriko, rezulte de socialaj politikoj fare de progresemaj registaroj en Argentino, Bolivio, Brazilo, Ekvadoro, Nikaragvo, Paragvajo, Venezuelo kaj Urugvajo, ĉ. 80 milionoj da homoj eskapis el malriĉo.

² En la mondo ĉ. 100 milionoj da infanoj (precipe inaj) ne vizitas lernejon; 650 milionoj da homoj ne disponas trink-akvon; 850 milionoj estas analfabetoj; pli ol 2 miliardoj ne disponas kloakojn, au necesejojn...; ĉ. 3 miliardoj vivas (t.e. nutras sin, loĝas, vestas sin, uzas transportilojn, zorgas pri si, ktp.) per malpli ol du eŭroj tage.

Britujo, Usono, Ĉinujo ... Kiel la imperioj disfalas

Ĉi-foje interkonsente, la usona parlamento (Kongreso) kaj la Blanka Domo konsideras uzi kontraŭ Ĉinujo rimedojn, kiuj povus komenci komercan militon. Trans la konjunkturaj kolermotivoj de Vaŝingtono, Usono malfacile povas toleri, ke ĝia plenpotenco estas kontestata. Aparte, se la kontestado venas de regiono, kiu estis kvazaŭ regata de la okcidentaj grandaj landoj.

de PHILIP S. GOLUB

EN KIUJ kondiĉoj la usona potenco estiĝis? Kiel, en apenaŭ unu jarcento kaj duono, la britaj ekskolonioj sukcesis anstataŭi Eŭropon sur la ekonomia, militista kaj kultura kampoj? Per duobla movado de ekonomia kaj kolonia ekspansio, la okcidenta Eŭropo fariĝis dum la 19-a jarcento la gravit-centro de nova malegaleca socia ordo: antaŭe necentrigita kaj senhierarkia, konsistanta el mondo-ekonomioj relative aŭtonomaj (Otomana Imperio, okcidenta Eŭropo, Ĉinujo, Mogola Imperio...) kun kompareblaj evolu-niveleoj, la monda sistemo transformiĝas kun la industria revolucio kaj la koncentriĝo de potenco kaj riĉeco en «Okcidento».

La ekonomia kaj teritoria ekspansio de Okcident-Eŭropo kaj tiu, ligita, de la eŭropaj loĝkolonioj kiaj Usono, partoprenas en tutecodinamiko. Kun etenditaj konsekvencoj, tiuj du formoj de ekspansio kune influas dum la jarcento por krei novan hierarkian strukturon de internacia rilatoj karakterizitan per divido inter, unuflanke, la eŭrop-atlantikaj dominantaj «centroj» kaj, aliflanke, la koloniaj «periferioj» dominataj aŭ dependaj.

En sia antaŭvida priskribo de la tutmondeco, Karlo Markso kaj Friedrich Engels substrekas en 1848, ke «la ekspluatado de la tutmonda merkato [donis] kosmopolitan karakteron al la produktado kaj konsumado de ĉiuj landoj [kaj] forigis la nacian bazon de industrio (...). Anstataŭ la malnovaj bezonoj kontentigitaj de la nacia produkto naskiĝas novaj bezonoj, postulantaj por sia kontentigo la produktojn de la plej foraj landoj kaj klimatoj. Anstataŭ la malnova izolado de provincoj kaj nacioj memsufiĉaj, disvolviĝas universalaj rilatoj, universala interdependo de la nacioj.»¹ Tamen, tiu ĉi tutmondeca aŭroranta sistemo estas nesimetria. La novaj industriaj landoj estas «la ekirpunkto kaj la alvenpunkto de la longaj trafikoj» kaj de la profitdona industrioj. Ili koncentras la riĉecon, la konon kaj la teknikajn sciojn, malhelpante ilian disvolvon aliloke. Kiel skribas Fernand Braudel, «la centro estas la dominantaj pinto, la kapitalisma superstrukturo de la tuta konstruaĵo. Ĉar estas reciprokeco de perspektivoj, se la centro dependas de la periferio por sia provizado, la periferio dependas de la bezonoj de la centro, kiu diktas sian leĝon.»²

Tial la unuigo de la monda ekonomio okazis en perforto. Laŭlonge de preskaŭ senĉesaj konkermilitoj, pli kaj pli gravaj partoj de la mondo estis enretigitaj en la produkt- kaj intersanĝretoj de la koloniaj imperioj. Ankorau ŝufice malgranda en 1750 (27 milionoj), la nombro de «malsuperuloj» metitaj sub rektan dominadon de Eŭropo eksplodas dum la 19-a jarcento: 205 milionoj en 1830, 312 en 1880, 554 en 1913. Al la loĝantaroj de tiuj formalaj imperioj, teritoriaj, aldoniĝas tiuj de landoj ŝajne sendependaj, sed submetataj al la trudaj sistemoj de distanca kontrolo kaj al la neformala imperia disciplino. Ĉe la sojlo de la 20-a jarcento, preskaŭ duono de la tutmonda loĝantaro tiel troviĝas perforte enretigita en internacia labordivido respondanta al la nuraj bezonoj de la nove industriigitaj landoj.

Britujo tiam dominas la sistemon kaj regas la marojn, la produktadon kaj la fluojn. En la mezo de la 19-a jarcento, kun nur 2 % de la monda loĝantaro, ĝi produktas 53 % de la fero, 50 % de la karbo kaj lignito, kaj akaparas preskaŭ 50 % de la kotono produktita en la mondo por nutri sian teks-industrion. Ĝia tiama konsumo de energio estas kvinoblo de tiu de Usono aŭ Prusujo, sesoblo de tiu de Francujo kaj cent-kvindik-kvinoblo de tiu de Rusujo. Britujo pezas kvaronon de la tutmonda komerc kaj du trionojn de la intersanĝoj de fabrikitaj produktoj.

Kvankam egaligita sur la industria kampo de Germanujo kaj preterpasita de Usono, la Brita Imperio, kiu etendiĝas de Pacifiko ĝis Atlantiko, tra Suda Azio, Afriko kaj Mezoriento, enhavas en 1913 kvaronon de la tutmonda loĝantaro. Ĝi formas la kernon de la monda financo kaj de la internaciaj investoj. Konstante kreskantaj, ĝiaj tutmondaj investoj – sed ĉefe koncentritaj en la dominaĵoj (dominions), en Latina Ameriko kaj

Usono, provizas 10 % de ĝiaj enspezoj en 1914. Antaŭ tiu dato, skribas la ekonomikisto John Maynard Keynes, «loĝanto de Londono povis, trinkante sian matenan teon, telefone mendi produktojn el la tuta tero, en laŭplaĉaj kvantoj (...), riski sian monon en la naturaj riĉofontoj aŭ la novaj entreprenoj de iu ajn mondopartoj (...), sendi sian serviston al la najbara banko por sin provizi per tiom da oro kiom li deziras [kaj] iri en forajn landojn sen ion ajn koni pri iliaj religio, lingvo kaj moroj, kunportante kun si mon-interŝanĝan riĉaĵon.»³

Ĉi tiu «unua tutmondigo» abrupte finiĝas en 1914, kiam la kunagado de naciismo kaj militismo donas mortigan baton al la eŭrop-centrita internacia ordo de la 19-a jarcento. La milito klare aperigas la kontraŭdiron inter la naciaj logikoj de potenco kaj ekspansio kaj tiu, transnacia, de kapitalismo. La milito ŝancelas la eŭropajn imperiojn stimulant, kiel rekonis la konservativa brita gvindanto Lord Curzon, «nekredeblan disvolviĝon» de la kontraŭkoloniaj fortoj kaj aspiroj. Ĝi malfermas vojon al la bolŝevisma revolucio en Rusujo kaj kreas fekundan grundon por faŝismo. Fine kaj ĉefe, elĉerpanta Eŭropon, ĝi abrupte akcelas la sisteman recenterigon de la Malnova Kontinento al Usono. Tiu lasta jam konsistigas gravan ĉeneron de la unua tutmondigo. Jam antaŭ la sendependiĝo de 1776, la britaj kolonioj de Nord-Ameriko aperas kiel esenca parto de la transatlantika ekonomia sistemo bazita sur la eltiro kaj komerc de koloniaj riĉofontoj. Post la sendependiĝo, la rolo de Usono en la transatlantikaj komerc-fluoj multe kreskis.

La internacia koton-industrio bone ilustras ĉi tiun potencigon. Ĉirkaŭ 1850 ĝi estas 20 % de la netaj importaĵoj kaj preskaŭ la duono de la valoro de ĉiuj britaj eksportaĵoj.⁴ Dum la sama periodo Usono fariĝas, danke al la plantejoj de la sudo, la ĉefa produktanto de koton. Provizante kvinonon de la monda produkto en 1820, ĝi produktas la du trionojn en 1860, antaŭ ol la milito de Secesio ĉesigis la sklavsistemon.

La mito de la usona izolismo

PER KOMERCO, transnaciaj fluoj de kapitaloj kaj loĝantaroj, Usono kaj Eŭropo estas implike ligitaj de la 19-a jarcento. Tiuj fluoj favorigis la enloĝadon kaj organizadon de teritorioj, akiritaj ofte perforte, dum la unua duono de la jarcento. Ĉi tiu ekspansia fazo, seninterrompa, devas esti komprenata kiel variaĵo de la eŭropa kolonia ekspansio; ĝi enradikiĝas en materiaj fortoj kaj kulturaj kaj rasaj bildigoj komunaj al ĉiuj koloniaj socioj, kaj estas integra parto de la tiama tutmonda ekspansia movado.

Malgraŭ la mito de usona izolismo, Usono klopodis kaj sukcesis akiri internaci-nivele grandigantan lokon. Ĝi ofte engaĝiĝis en enrudaj operacioj en la nove kreita kolonia periferio, kelkfoje kune kun la eŭropaj armeoj. Inter 1846 kaj 1898 ĝi kondukis dudek ok militajn intervenojn en Latina Ameriko kaj dek naŭ en la regiono Azio-Pacifiko, dum ĝi samtempe kondukis konstantajn «operaciojn» kontraŭ la amerikaj indianoj de sia kontinento.

La milito kontraŭ Hispanujo en 1898 kaj la koloniado de Kubo kaj Filipinoj markas transiran periodon inter ĉi tiu unua ekspansio-fazo kaj tiu, pli neformala sed pli vasta, de la periodo post 1945. En la mezo de la 19-a jarcento, la usonaj ekspansivistoj interpretas sian teritorian plivastigon kiel esprimiĝon de sia «evidenta destiniĝo»⁵ por instali sian superecon sur la kontinento kaj, preter ĝi, sur la tuta Okcidento.

Reinterpretante la tutmondan historion el sia nova pozicio de industria dominado (23,5 % de la monda fabrika produktado kontraŭ 18,5 % por Britujo en 1900) kaj pro la kreskinta graveco de siaj internaciaj engaĝiĝoj, la ekspansivistoj de la fino de la jarcento imagis la usonan potencigon kiel rezulton de historia procezo de selektado kaj imperia heredaĵo. Anticipante la venontan «tutmondan ekonomian superecon» de la lando, proksimumo de prezidanto Theodore Roosevelt, fervora ekspansivisto, skribas en 1900: «Estas neniu kialo, ke Usono ne fariĝu centro de riĉeco kaj potenco pli granda ol iam estis Britujo, Romio aŭ Konstantinopolo.»⁶

La du mondmilitoj konfirmas ĉi tiun vizion de historia destino. Tuj post la unua milito, la britaj elitaj devas akcepti la ideon de la «anglosaksa



MAXIME MUCRET / «Pollinisation», 2011

paco» (*pax anglo-saxonica*), tio estas divido de la mondaj «respondecoj» kun Usono. Sed tiu jam antaŭvidas la estontan *pax americana*. En 1939 la influhava internaciisto Walter Lippmann skribas «*Dum la daŭro de la generacio al kiu ni apartenas, okazis unu el la plej gravaj eventoj el la tuta historio. La potenclando, kiu regas la okcidentan civilizacion transiris Atlantikon.*»⁷ En 1946, ankaŭ prezidanto Harry Truman reprenas la ideon de imperia heredaĵo: «*De la Persujo de Dario la 1-a, la Grekujo de Aleksandro, la Romio de Hadriano, la Britujo de reĝino Viktoria (...), neniu nacio, neniu naci-grupo ricevis tiom da respondecoj kiom ni.*»⁸

Post 1945, Usono ja troviĝis centre kaj ĉepinte: ĝi anstataŭis Eŭropon, restrukturis kaj modernigis la mondan kapitalisman ekonomion, kaj starigis sistemojn de sekurec-aliancoj, kiuj pludaŭras nun. Malgraŭ la «dupoluseco» de mondo dividita inter kapitalisma kaj komunisma blokoj, Usono plu dominas la internacian sistemon dum la postmilitaj jardekoj. Kontraŭe al la tro fruaj prognozoj pri «kadukiĝo» en la jaroj 1970-aj kaj 1980-aj, ĝi troviĝas, ĉe la fino de la malvarma milito, kerne de la dua ciklo de tutmondigo.

Dum Usono fariĝis la nura «tre potenca lando» en tutmondigita kapitalisma ekonomio, ties elitaj ekrevas pri nova «usona jarcento». En 1998 s-ro Zbigniew Brzezinski asertas, ke «*la etendiĝo kaj la ĉiama ĉeesto de la superpotenca Usono estas hodiaŭ unikaj.*»⁹ Tri jarojn poste, s-ro Henry Kissinger elvokas «*La tutmondan aŭtoritaton de Usono (...)* senkomparan kun tiu de la plej grandaj pasintaj imperioj.»¹⁰ Tiu triumfisma momento ne daŭris. Du militoj kaj la financa kaj ekonomia krizo okazis. Tamen, la imperiaj bildigoj pludaŭras: ĉu s-ro Barack Obama ja ne donis al si la celon «*fari el tiu jarcento alian usonan jarcenton?*»¹¹

Sed la sistemo nun emas al plurcentrismo. La reapero de Azio kaj aliaj grandaj postkoloniaj regionoj dum la lastaj jardekoj kaj la nova rolo de kontinent-landoj rolantaj, kiel Ĉinujo, kiel duonaŭtonomaj centroj de la tutmonda kapitalismo, ŝanĝas la organizon. Usono sendube restos tre potenca lando, sed ĝi devos akcepti plurecon kaj pli modestan rolon en la tutmondaj aferoj.

¹ Karlo Markso kaj Friedrich Engels, *Manifesto de la komunista partio*, 1848.

² Fernand Braudel, *La dynamique du capitalisme*, Arthaud, Parizo, 1985.

³ John Maynard Keynes, *Les Conséquences économiques de la paix*, Gallimard, Parizo, 1919.

⁴ Eric J. Hobsbawm, *Industry and Empire: From 1750 to Present Day*, Penguin Books, Londono, 2000.

⁵ Vd Reginald Horsman, *Race and Manifest Destiny: The Origins of American Racial Anglo-saxonism*, Harvard University Press, Cambridge, 1999.

⁶ Brooks Adams, *America's Economic Supremacy*, The Macmillan Company, Nov-Jorko, 1900.

⁷ Walter Lippmann, «The American Destiny», *Life Magazine*, Nov-Jorko, 1939.

⁸ Citita de Donald W. White, «History and American Internationalism: The formulation from the past after World War 2», *Pacific Historical Review*, vol. 58, n-ro 2, University of California Press, Berkeley, majo 1989.

⁹ Zbigniew Brzezinski, *The Grand Chessboard: American Privacy and its Geostategic Imperatives*, Basic Books, Nov-Jorko, 1997.

¹⁰ Henry Kissinger, *Does America need a Foreign Policy?*, Simon and Shuster, Nov-Jorko, 2002.

¹¹ Rimarkoj de prezidanto Barack Obama antaŭ komuna sesio de ambaŭ ĉambroj de la usona parlamento, la 24-an de februaro 2009.

Hispanio, en tuja danĝero

de IGNACIO RAMONET

La historia decido de la organizo ETA (Eŭskadi Ta Askatasuna; eŭskalingve, Eŭskio kaj Libero), anoncita la 20-an de oktobro 2011, pri senkondiĉa «definitiva ĉesigo de la batalado» metas finan punkton al 43 jaroj de politika perforto en Hispanio kaj markas la malaperon de iusen-ce tragika hispana escepto en Eŭropo.

Depost la morto de la diktatoro Franco en 1975 kaj la perreferendumo akcepto de la hispana Konstitucio en 1978, nenio pravigis la uzadon de politikaj murdoj, atencoj aŭ perarmila perforto. Ĉio tio (same kiel torturado kaj polica subpremado) kaŭzis enorman socian suferadon kaj centojn da mortintoj. La propra eŭska socio, kiel la eŭsknaciisma gvidanto Arnaldo Otegi agnoskis en julio 2011, ne plu toleris terorismen.

Nun necesas antaŭenpuŝi la konstruadon de paco kaj kunvivado, sen venkintoj kaj venkitoj, ene de la kadro, kiun la 17-an de oktobro 2011 difinis la rondo de internaciaj spertuloj en la Fina Deklaro de la Packonferenco de Donostio.¹ Ĉi tiuj konsilis «pritrakti nur la konsekvencojn de la konflikto», t.e.: la situacion de la malliberuloj kaj de la subteruloj; la redonon de la armiloj; la kompensadon kaj helpadon al ĉiuj viktimoj; la agnoskon de la kaŭzita suferado; kaj la helpojn por resanigi la personajn kaj sociajn vundojn. Sed se oni deziras porĉiame starigi pacon, oni devos ankaŭ antaŭenigi en politike respondeca maniero la partoprenon de ĉiuj demokratiaj partioj de Hispanio kaj Eŭskio.

Estas interese observi, ke ETA anoncis sian rezignon pri armiluzado ĝuste unu monaton antaŭ la decida leĝdona elekto de la 20-a de novembro 2011. Tiun elekton, laŭ opinienketoj, tre probable gajnos la Partido Popular / Popola Partio (PP), venkinto ĉe la lastaj lokaj elektoj. Ĉu ETA volis iel influi tiun elekton? Ĉu ĝi deziris, per ĉesigo de sia perforta agado, apogi naciisman linion neperfortan, al kiu, kiel pruvis la sukceso de la politika koalicio Bildu en la urbaj elektoj de majo 2011, simpatias granda parto de la eŭsknaciisma elektantaro? Kiugrade la finon de la teroro povus elektocele kapitaligi la Partido Socialista Obrero Español / Hispana Laborista Socialista Partio (PSOE) kiel politikan sukceson de la nuna registaro ebligantan mildigi la antaŭanoncitan malvenkon?

Multaj elektontoj de PSOE estis fakte pretaj ĉi-foje puni la partion de José Luis Rodríguez Zapatero. Ne nur pro la nekutima krizo vipanta la landon, sed pro la brutala alĝustigpolitiko («nepopularaj sed necesaj», asertis la prezidanto) trafantaj precipe la mezajn kaj malaltajn klasojn, same kiel emeritojn kaj junulojn. Kaj ankaŭ pro tio, ke Zapatero – montranta, laŭ sia opinio, «politikan kuraĝon» – kapitulacis antaŭ la merkatoj, senhezite alprenante la ultraliberalajn liniojn postulatajn de la internaciaj investantoj, la Internacia Monfanduso, la Eŭropa Centra Banko kaj la germana kanceliero Angela Merkel.

Krome ŝajnas, ke la nuna malpopulareco de prezidanto Zapatero forprenas de li pudoron, kio ebligas al li alpreni, je la fino de la mandato, senhonte konservemajn decidojn, kiuj konsistigas lastajn defiojn al siaj socialismaj elektantoj. Ekz.: la freŝa reformo de la Konstitucio, sen referendumo, por limigi la buĝetdeficiton, kiel postulis Francio (kiu mem ne havas tian regulon) kaj Germanio. Aŭ la tre polemika decido de la 4a de oktobro 2011 (kiam la parlamento estis jam eksigita) subskribi interkonsenton, laŭ kiu Hispanio cedas al Usono la bazon de Rota kiel mararmean sidejon de la kontraŭmisila ŝildo de NATO.

Zapatero postlasas tre malfacilan situacion al sia posteulo, Alfredo Pérez Rubalcaba, ĉar la Socialisma Partio restas perpleksa, konfuzita, ŝokita, perdiĝinta, elĉerpita kaj venkita. PSOE ne facile resaniĝos. Ĝi travivos longajn jarojn de marŝado tra dezerto atendante sian refondiĝon.

Tio ne estas bona novaĵo por Hispanio. Ĉefe ĉar la maldekstro de la maldekstro, de kie devus veni la plej aŭdacaj kaj konstruataj ideoj por eltiri la landon el la koto, estas tro diserigita. Kaj ĉar aliaj progresemaj fortoj kreskantaj en la cetera Eŭropo, kiel la politika ekologio, troviĝas en Hispanio ankoraŭ en la nenio.

Ĉi tiu kunteksto favoras PP el elekta vidpunkto. Efektive, la opinienketoj antaŭanoncas tiun partion venkonto de la venonta elekto. Multaj elektontoj pretaj voĉdoni por ĝi, pensante ke eventuala registaro de Mariano Rajoy faros malsaman ekonomian politikon ol tiun de Zapatero – t.e., politikon sen alĝustigoj, sen reduktaj kaj sen ŝparemo –, devas scii, ke ne estos tiel. Simple ĉar Zapatero, en la lastaj 18 monatoj, faris el ekonomia vidpunkto dekstran politikon, kiun Rajoy ankoraŭ pli intensigos.

Sufiĉas ĵeti rigardon al tio, kiel nuntempe kondutas la dekstro en aliaj lokoj. En Katalunio, ekzemple, la kataluna registaro prezidata de Artur Mas (Convergència i Unió / Konverĝo kaj Unuigo) aplikas («sen hezito», diris Mas) drastajn reduktajn en la san- kaj lernosektoroj, pro kio la protestoj forpafiĝis. En la sansektoro, ekzemple, li anoncis ŝparon de 1 miliardo da eŭroj, t.e. 10 % de la rimedoj disponeblaj en la antaŭa mandato, kiam regis tripartia koalicio. Tio signifas fermon de hospitaloj, forigon de ĉambroj kaj operaciejoj, perdon de litoj, maldungon de helpantoj kaj kuracistoj, forskrapon de noktaj deĵoradaj, ktp, t.e. punon por la pacientoj.

En Kastilio-Manĉo prezidantino María Dolores de Cospedal (PP) prezentis fine de aŭgusto 2011 krizo-planon por ŝpari pli ol 1,8 miliardojn da eŭroj. Ŝi malpermesis dungojn por vakaj ŝtatoficistaj postenoj en ĉiuj sektoroj kaj forstrekis 40 % de la postenoj de portempaj dungitoj en la publikaj administrejoj. Al la instruistoj de elementaj, bazaj kaj mezaj lernejoj oni aŭtoritate plialtigis la semajnan instrutempon je du horoj. Oni forigis preskaŭ ĉiujn centrojn de trejnado de instruistoj. Kaj la plej grandajn reduktajn oni antaŭvidas en la sansektoro.² Por PP, Kastilio-Manĉo estas la laboratorio pri tio, kion la dekstro faros, se Rajoy sukcesos prezidantiĝi. La danĝero estas do tuja. Aŭ ĉu María Dolores de Cospedal mem ne difinis sian brutalan ŝokterapion kiel «ekzemplon» por la tuta Hispanio?

¹ El País, Madrido, 18-a de oktobro 2011

² El País, Madrido, 31-a de aŭgusto 2011

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro «*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj...*». Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la repaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Ili disponeblas ankaŭ en la UEA-libroservo dum la UK.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen la laste aperintaj:

KARLO MARKSO: *La kapitalo*. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7.

KARLO MARKSO; FREDERIKO ENGELSO: *Tezroj pri Fojerbaĥo*; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5.

FREDERIKO ENGELSO: *La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato*, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8.

ARNOLD PETERSEN: *Komentoj al la «Komunista Manifesto»*, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9.

Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010), WERNER SEPPMANN: «Riskokapitalismo»; RICHARD SORG: «Domenico Losurdo interpretas Niĉeon»; CHRISTINA KAINDL: «Subjektiveco en la krizo»; HARALD WERNER: «La krizo en la ordinara konscio»; CHRISTOPH BUTTERWEGE: «Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco», Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9.

WERNER SEPPMANN: «Laboro kaj dialektiko - Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado»; HARALD NEUBERT: «La «historia misio de la laborista klaso» ĉe Markso kaj Engelson kaj la historia realeco»; HANS KÖLSCH: «Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe»; OTTO MEYER: «Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?» Eseo elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2.

ADJĖVI ADJE: *El togolanda saĝosako*, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-20-5.

ELMAR GETTO: *Brazilo transe de piedpilkaj sambo*. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete).

IVAN EFREMOV: *La nebulozo de Andromedo*, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3.

DOMENICO LOSURDO: *Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ*, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7.

MARITZA GUTIÉRREZ: *José Martí – de kie kreskas la palmo*, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1.

KARLO MARKSO: *La kapitalo*. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4.

Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, ALEXIS PASSADAKIS kaj HENDRIK SANDER: Konkurenceno en la forcejo Klimatopolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; HANS-JÖRG SCHIMMEL: «La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto»; KARL HERMANN TJAEDEN: «Kapitalmoviĝo kaj klimata okazigo»; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN.

GEORGO PLEĤANOV: *Pri rolo de la persono en la historio*, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

KARLO MARKSO: *Pri la juda demando*, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8.

EDDY RAATS: *Post la pluvo, pluvego*, Travivaĵoj de junulo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2.

ADEBAYO AFOLARANMI: *Ronke, la ĵaluzulino*, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9.

JOZEFO ŜLEJFŜTEJNO: *Enkonduko en la studadon de Markso, Engelson kaj Lenino*, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4.

IVAN EFREMOV: *La Horo de Bovo*. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3.

ROGER MARTELLI: *La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES*, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6.

KARLO MARKSO: *Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio*. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0.

MIRIAM RODRÍGUEZ ALVERA: *Desegni la parkon*, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6.

«Kien Afriko en la 21-a jarcento?» *Le Monde diplomatique en Esperanto*, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7.

PAŬLO POPO: *Ĉu sekso subfosas?* Maldekstraj teorioj de seksa liberigo kaj de malkonstruo de seksa identeco. Elger-

manigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0.

ŜTEJGERVALDO, ROBERTO: *Komunistaj star-kaj disput-punktoj*, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3.

JÜRGEN ALBOHN: *Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo - Kritiko de la Wertkritik*. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7.

V. I. LENIN: *Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio*. Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4.

UNUIĜINTAJ NACIOJ: *Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migrantaj laboristoj kaj de iliaj familianoj*. Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1.

KARLO MARKSO kaj FREDERIKO ENGELSO: *Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo, komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8.*

KARLO MARKSO: *La kapitalo*. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4.

Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn, tr. Jeanne-Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2.

MIRIAM RODRÍGUEZ: *Profiloj de Suno kaj Luno*, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5.

FREDERIKO ENGELSO: *Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio*, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-48-9.

GEORGO DIMITROFO: «Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio»; HARALD NEUBERT: «La Kominterneno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco»; kun enkonduko de Günther Judick, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-45-8.

LE MONDE
diplomatique
EN ESPERANTO

Le Monde diplomatique en Esperanto aperas rete (<http://eo.mondediplo.com>) laŭ kontrakto kun la direktoro de la franca originalo, *Le Monde diplomatique*, en Parizo. Tiu ĉi eldono estas laŭokaze papera eldono sub la respondeco de la ĉefredaktisto de *Le Monde diplomatique en Esperanto*, Vilhelmo Lutermano, kies retadreso estas: vlutermano@gmail.com. Ĝi estas prizorgata de la Monda Asembleo Socia (MAS), <http://mas-eo.org>. Bildoj laŭ licenco de *Le Monde diplomatique*. Enpaĝigis: Alberto Fernández-Callenes Barrios kaj Yodanis Mayol González.